

V-19479/55 (1986)

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

•
UNESKO KAJ
ESPERANTO

•
JUNULARA
SEMINARIO

•
E-VETERANOJ
JUBILEAS

•
EMOCIA
RENKONTIGO

•
HEROA
PASINTECO

•
REMEMOROJ

•
LINGVAJ
PROBLEMOJ

•
NIA E-ORFEO



JARO 55 • N-RO 1 • JANUARO • 86

„MI ALTE APREZAS LA INTERNACIAN ESPERANTO-MOVADON...”



La Ĝenerala Direktoro de UNESKO s-ro AMADOU MAHTAR M'BOW estas naskita en 1921 en Dakaro, Senegalo. Lia familio apartenas al la tribo de jolovitoj. Li partoprenis la Duan Mondmiliton. Li finis siajn studojn en la Lernejo por Elektro-Inĝenieroj kaj en la Fakultato pri Humanismaj Sciencoj (historio kaj geografio) en la Sorbono, Parizo. Li estis profesoro en la kolegio Derozot en Maŭrolando, direktoro de la Fakultato pri Elementa Klerigo en Senegalo, Ministro de la Klerigo kaj Kulturo.

En 1966 s-ro M'Bow estas elektita membro de la Plenumkomitato de UNESKO. De 1970 ĝis 1974 li estas Vic-Ĝenerala Direktoro de UNESKO pri la problemoj de klerigo. La 14-an de novembro 1974 s-ro M'Bow estas elektita Ĝenerala Direktoro de tiu organizaĵo. En 1980 li estas reelektita sur la sama posteno.

S-ro A.M.M'Bow estas aŭtoro de multaj monografioj, raportoj, lernolibroj kaj aliaj publikaĵoj pri la problemoj de la afrika kulturo, historio, geografio, etnografio, samkiel pri problemoj de la klereco kaj kulturo en la mondo. Li estas proklamita honorodoktoro (Doctor honoris causa) de la universitatoj en Buenos-Ajres, Granado, Bel-fasto, Sofio, Venecio, Upsalo, Moskvo, Parizo, Bogoto, Prago, Kvebeck, Meksiko, Beogrado, Berlino, Delhio, Marsejlo kaj aliaj.

S-ro Amadou Mahtar M'Bow estas Laŭreato de la Internacia Dimitrov-Premio.

La 13-an de oktobro 1985 en sia regula dimanĉa programero „Kunparolanto laŭ via deziro“ la Bulgara Televido elsendis intervjuon kun s-ro Amadou Mahtar M'Bow. Interalie al li estis direktita jena demando:

— Kiamaniere UNESKO helpas la evoluon de la internacia lingvo Esperanto?

— UNESKO ne okupiĝas speciale pri la evoluo de la apartaj lingvoj. UNESKO konsideras ĉiun lingvon kultura fakto, kultura fenomeno. Nature, ĉiu popolo strebas konservi kaj evoluigi sian lingvon. Se en certa grado UNESKO nun estimo rilatas al ĉiuj kulturaj fenomenoj kaj se en certa grado UNESKO kontribuas por ilia plifortigo — en tiu senco UNESKO emas certigi la evoluon de ĉiuj lingvoj.

Kio koncernas Esperanton, UNESKO agnoskis la Universalan Esperanto-Asociacion (UEA), kiu estas en konsultaj rilatoj kun nia organizo kaj kunlaboras kun ni. Mia opinio la esperantista movado eliras el la kadroj de tiu ĉi lingvo. Alivorte ĝi estas movado, kiu strebas al plifortigo de la kunlaborado inter la homoj, sendepende de ilia nacieco kaj el kiu lando ili devenas. T. e., per la uzado de unu komuna lingvo tiu ĉi movado strebas al proksimigo de la apartaj popoloj. Kaj tiu ĉi movado faras tion laŭ tre nobla maniero, kiun mi alte aprezas. Tiu agado posedas altan humanan spiriton kaj mi gratulas tiun ĉi spiriton.“

(S-ron M' BOW intervjuis la bulgara televida ĵurnalistoj KEVORK KEVORKJAN en la programo de Bulgara Televido „ĈIUN DIMANĈON“)

Feliĉan Novan Jaron!

Karaj legantoj de „Bulgara Esperantisto“,

Ni tutkore bondeziras al vi kaj al viaj familianoj feliĉan Novan Jaron 1986, sanon, sukcesojn kaj prosperon.

Ni sincere dankas ĉiujn niajn kunlaborantojn — dank' al ilia sindona laboro kaj iniciatemo la legantaro de „BE“ estis ĝustatempe informata pri ĉiuj gravaj kaj interesaj aranĝoj kaj eventoj en viaj E-societoj, pri via aktivado por disvastigo de Esperanto kaj diskonigo de ĝiaj atingoj en ĉiuj sferoj de la vivo.

Ni esperas, ke ankaŭ dum la Nova Jaro 1986 vi daŭrigos vian necesan kaj tre utilan laboron kiel korespondantoj kaj propagandantoj de „Bulgara Esperantisto“.

Ni kune kontribuu por plenumo de la gravegaj taskoj, starigitaj de la 41-a kongreso de BEA.

Ek al laboro, karaj amikoj!



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 55

JANUARO

1 • 1986

1986 — JARO DE PACO

VIOLIN OLJANOV,
ĉefredaktoro de gazeto „Paco“

La Organizo de Unuigintaj Nacioj nomis la jaron 1986 Jaro de la Paco. Kion ĝi signifas? Ja la popoloj ĉiujare, konstante strebas al paco! Ĉu estas io nova en la dispozicio de la problemo?

La vetarmado atingis tiajn dimensiojn, kiajn antaŭe oni ne povis eĉ imagi. La pasintan jaron la mondo elspezis por superarmado 800 miliardojn da dolaroj — sumo sufiĉa por satigi ĉiujn malsatantojn en la mondo. Sed fakte, rezulte de tiuj elspezoj, la monda arsenalo estis kompletigita per tiom da pliaj novaj amasmortigiloj, kiuj jam en la unua tago de eventuala milito povus kaŭzi katastrofon sur la planedo Tero.

Oni multe parolis pri la amasa mortiga efiko de la nukleaj armiloj, pri la longdaŭraj postsekvaj de radiado, pri venenigo de la aero, de la flaŭro kaj faŭno, pri apero de nekuraceblaj malsanoj.

Sed la lastaj esploroj montris, ke tio ne estas ĉio, kio atendas la malfeliĉan homaron. La nuklea milito lasos post si apokalipsan spektaklon. Sur la Tero ekestos dezertiga nuklea vintro, sekve de la nukleaj eksplodoj aperos grandegaj incendioj, kiuj produktos enorman kvanton da fulgo. Pro ili ŝanĝiĝos la cirkuladsistemo en la atmosfero, aperos aertorentegoj, kiuj rapide vuolos per fumkurteno la tutan terglobon. Ekregos totala mallumo. Sekve de tio rompiĝos la radiadekvilibro de la planedo kaj estiĝos ĝeneralaj ŝanĝoj en la klimato, kiuj estos plurfoje pli danĝeraj por la vivo ol la rektaj efikoj de la nuklea atako — frapa ondo, varm-eligado, radiado.

El tiu tre konciza kaj tute ne kompleta bildo de la postnuklea mondostato oni povas klare kompreni, ke en la eventuala estonta milito ne

estos venkintoj kaj venkitoj, ĉar ne estos postvivantoj.

Pro tio frenezulajn intencojn prezentas la astraj militoj. Sed frenezulojn oni devas bridi. „Oni — tio estas ni ĉiuj — la homoj dezirantaj vivi en paco sur nia planedo. Ni ĉiuj devas esti sur nia pacposteno ĉiutage, ĉiuhore ĉiuminute. Unueca monda fronto de popoloj kaj registaroj estas necesa en la nuna danĝera momento.

Tio ja estas la grandsignifa senco de la Jaro de Paco. Mobilizi ĉiujn fortojn por pacbatalo, atentigi la registarojn pri la senpera danĝero kaj instigi ilin al malarmado, al rezigno pri la homarocidaj planoj, al intertraktadoj kaj solvo de la mondaj problemoj laŭ politika vojo. Oni uzu la miliardojn da dolaroj por forigo de la malsato, de la malsanoj, por estigo de trankvila kaj kreanta homaro. Oni utiligu la teĥnikan revolucion, la homan genion por la celoj de la progreso, por paca kaj feliĉa vivo.

Ni ofte sloganas: „Per Esperanto al mondpaĉo!“ Efektive Esperanto estas ido de la pacamaj idealoj de Zamenhof. Tamen tiun sloganon kaj tiujn ideojn ni devas realigi per agoj, per ĉiutaga aktivado. Subteno al la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) estas devo de ĉiu bulgara esperantisto. Abonado kaj disvastigo de ĝia organo „Paco“ estas ne nur kontribuo al la batalo por paco, sed abunda fonto de informoj kaj argumentoj utilaj en nia varbada kaj propaganda aktiveco. Grava kaj fruktodona maniero gajni pacbatalajn amikojn estas la internacia korespondado. Utiligu ĝin konstante kaj amase!

La homaro estas en danĝero. Ni alarmu! Ni uzu maksimume niajn fortojn kaj kapablojn por bremsi la vetarmadon, por barikadi la vojon de la milito!

Rezolucio de UNESKO pri Esperanto



Dank' al la energiaj klopodoj de s-ro Tibor Sekelj, observanto de UEA en la okazinta en Sofio XXIII Sesio de la Generala Konferenco de UNESKO (8.10.-12.11.1985), la Pleno de la Generala Konferenco akceptis, la 8-an de novembro 1985, novan rezolucion favore al Esperanto.

Ĉi-sube ni proponas al via atento plenan tekston de tiu rezolucio (Rezolucio de Unesko XI.4.4.218).

La Generala Konferenco,

Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.4 422-4224 notis la atingojn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka interkompreniĝo de la popoloj en la mondo, kaj rekonas, ke tiuj atingoj kongruas kun la celoj kaj idealoj de UNESKO,

Memorigante, ke Esperanto faris intertempe konsiderindan progreson kiel ilo por la antaŭenigo de reciproka interkompreniĝo de popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj aktivecoj,

Rekonante la grandajn eblecojn de Esperanto por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter homoj de malsamaj naciecoj,

Notante la konsiderindan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio por la diskonigo de informoj pri la agado de UNESKO, same kiel ĝian partoprenon en ties aktivecoj,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni celebros la centjariĝon de ekzisto de Esperanto,

1. **Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centjariĝo;
2. **Petas** la Generalan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto, kiel ilo por pli bona kompreniĝo inter diversaj nacioj kaj kulturoj;
3. **Invitas** la Statojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaracioj, per eldono de specialaj poŝtmarkoj ktp, kaj stimuli la enkondukon de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj institucioj de supera edukado;
4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizoj aliĝi al la celebrado de la centjariĝo de Esperanto, kaj konsideri la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por diskonigo de ĉiuspecaj informoj inter siaj membroj, inkluzive de informoj pri la laboro de UNESKO.

NI AGU PLI EFIKE

En daŭro de unu semajno la Internacia Esperanto-Kur-sejo (Pisanica) estis junulara teritorio: de la 21-a ĝis la 27-a de oktobro 1985 la Junulara Sekcio ĉe BEA okazigis sian tradician seminarion — sesan laŭvice. Ĝia ĉeftemo estis: „Kiamaniere altiri kaj reteni junulojn en la Esperanto-movado“. Tio estis la unua pli grava aranĝo de la nova estraro. La seminarion partoprenis ĉirkaŭ 30 junaj aktivuloj el la lando kaj kelkaj eksterlandaj gastoj: Marie Vančurova — unua vicprezidanto de TEJO kaj prezidanto de la Junulara Sekcio ĉe ĈEA, ŝiaj kolegoj el la Sekcia Estraro Zdenek Mrkvica — vicprezidanto kaj Pavel Grůň — sekretario. Reprezentantoj de la jugoslava kaj hungara junularaj E-movadoj estis Tomislav Jolić el Zenica kaj László Radácz el Budapeŝto.

Malgraŭ la serioza preparlaboro la seminarion ne partoprenis reprezentantoj de ĉiuj distriktoj. Sed tio ne malebligis la organizantojn informi pri la reala stato de la landa junulara E-movado — evidentiĝis, ke en multaj loĝlokoj ankoraŭ ne ekzistas junularaj E-grupoj. Oni pridiskutis la laborformojn lige kun la nova organiza strukturo de la sekcio laŭ la Statuto de BEA, akceptita de ĝia 41-a kongreso. Dum la simpozio estis priparolita grava organiza malperfektaĵo: konstante kaj preskaŭ ĉie oni organizas E-kursojn, sed oni ne serĉas interesajn formojn por altiri la gekursanojn en la organizan vivon de la junularaj E-grupoj jam dum la lernado. Pro tio multaj kursanoj rifuzas lerni Esperanton kaj aliaj, eĉ ellerninte ĝin, restas ekster la movado, ĉar ili ne sukcesis (t. e. ĉar ni ne helpis al

ili!) trovi sian lokon en ĝi. Oni ne sufiĉe laboras por varbado de junaj homoj kun diversaj profesioj, el diversaj sociaj medioj. En iuj distriktoj urboj eĉ mankas junaj E-aktivuloj kaj pro tio la lokaj distriktoj estraroj devas turni seriozan atenton al la problemo pri la estonteco de la E-movado en sia distrikto. Simila estas la stato ekzemple en Pernik kaj Tolbuhin. Ofte niaj gejunuloj ne povas trovi konvenan ejon por siaj kunvenoj. Tiun problemon kaj multajn aliajn ili solvos nur per konstanta kunlaboro kun la sociopolitikaj organizoj: Komso-molo, Patrolanda Fronto, k. a.

La partoprenantoj en la seminario esprimis komunan konvinkon, ke la gejunuloj restos en nia movado, se helpe de Esperanto ili povus pliriĉigi siajn profesiajn konojn, agrable kaj utile pasigi sian libertempon per E-turismo, kolektado k. a. Alivorte, nia slogano kaj la plej grava celo de nia agado estas: Esperanto — en la vivon, sed ne Esperanto por si mem! Interesaj estis la raportoj: „Esperanto kaj turismo“ de Nikola Nikolov, „Aplikado de la Internacia Lingvo en amatora arto“ de Ljubomir Trifonĉovski. Oni prelegis pri Esperanto kaj kooperativoj (Metodi Angelov), pri la sperto de la E-societo en Gabrova panuzino kaj pri la eksperimento en 8-a Sofia Unueca Politeknika Lernejo (Maria Jankova). Grandan intereson ĉe la aŭskultantoj vekis la raporto de la juna verkisto Georgi Miĥalkov pri originala E-poezio. Reprezentantoj de la Junulara Sekcio rakontis pri sia partopreno en la internacia Junulara E-Kongreso en Eringerfeld (Cvetka Miteva), en la Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Moskvo (Me-

todi Angelov), en la Balkana Kongreso en Ateno (Kremona Bâceva). Hristo Filipov el Pleven parolis pri la junulara internacia brigado en Guljanci. Sian sperton kiel instruistinoj de Esperanto dividis Hristina Nikolova kaj Veneta Baleva. L. Trifonĉovski parolis ankaŭ pri UNESKO kaj junularo.

La eksterlandanoj rakontis pri sia E-sperto en la junulara movado.

Dum la seminario estis priparolitaj la sekcia laborplano por 1986 kaj la anoncita konkurado „100-jarojn Esperanto“ inter la junularaj E-grupoj en la lando.

Gojiga fakto estas, ke dum la seminario oni parolis por unua fojo nur en Esperanto kaj ankaŭ ĉiuj dokumentoj estis preparitaj en Esperanto. La partoprenantoj en „Parolanta Rondo“, gvidata de Georgi Miĥalkov kaj Mariana Elenova, pasigis agrablajn horojn.


Gaja etoso regis ankaŭ en la diskoteko: lecionoj pri danco, gastoj el Siroka Lâka — membroj de folkloro kant- kaj dancensemblo.

Ege interesaj estis la rakontoj de s-ro Tibor Sekelj, fame konata esperantisto kaj vojaĝanto. Per siaj lumbildoj li „kondukis“ la junulojn tra Amazonio.

Oni jam pripensas la diskutotajn temojn, la eventualajn partoprenontojn en la sekvonta — sepa junulara seminario, esperante ke ĝian laboron partoprenos junaj esperantistoj el ĉiuj distriktoj, kiuj parolos Esperanton pli bone ol pasintjare kaj raportos pri sia aktiva agado surloke. Sed antaŭ tio nin atendas la Botev-recitalo en Vraca, la Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Razgrad kaj multaj aliaj interesaj aranĝoj. Ni aktive partoprenos en ili, ĉu ne?

Maria JANKOVA,
sekretariino de la Junulara Sekcio ĉe BEA

E-VETERANOJ JUBILEAS



Niaj E-veteranoj-jubileuloj (de dekstre maldekstren) — Kr. Karucin, Z. Ivanov, I. Spasova kaj Ĥr. Kanev dum la celebra ceremonio.

La 13-an de novembro 1985 la Sofia Esperantista Kulturdomo „M. Gorkij“ organizis solenaĵon dediĉitan al kvar veteranoj-esperantistoj, aktivaj batalantoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo: Zahari Ivanov — 80-jara, Ivanka Spasova — 75-jara, Krâstju Karucin — 75-jara kaj Ĥristo Kanev — 75-jara.

Kortuŝaj estis la rakontoj pri ilia kontribuo al la kontraŭfaŝisma batalo kaj por disvastiĝo de la Bulgara E-movado.

Junaj E-aktivuloj salutis la jubileulojn. La komponaĵo „Dediĉe al la avoj“ de Iva kaj Neli Ivanovi pliriĉigis la programon. En la nomo de Sofia E-Kulturdomo „M. Gorkij“ kantgrupo „Orbita“ gratulis la veteranojn per kelkaj kantoj, iuj el ili plenumitaj en Esperanto.

Estis tralegita la Dekreto de la Stata Soveto de PR Bulgario pri distingo de la veteranoj per ordenoj: „Popola Respubliko Bulgario“, I grado — al Zahari Ivanov, Ivanka Spasova kaj Krâstju Karucin kaj „Popola Respubliko Bulgario“, II grado — al Ĥristo Kanev.

En la nomo de Urba Komitato de Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo estis tralegitaj gratuladreso al la jubileuloj.

La prezidanto de BEA Ĥristo Gorov prezentis donacojn al la veteranoj kaj kore salutis ilin.

En la nomo de la jubileuloj Krâstju Karucin dankis al la organizantoj de la solenaĵo kaj al ĉiuj partoprenantoj kaj promesis plu labori por disvastiĝo de la Internacia Lingvo.

Al niaj karaj veteranoj ni bondeziras sanon kaj fortojn por plua sindona laboro por prospero de la Internacia Lingvo kaj de nia Esperanto-movado.

Nedka VALJAVIĈARSKA

80 jarojn „Vekiĝo“

En urbo Sumen antaŭ kaj post nia liberigo elsub osmana sklaveco laboras vigla kaj progresema inteligencio. Ne estas malgranda la kontribuo de la urbo al la kultura historio de nia lando. Nome pro tio jam en la komenco de nia jarcento Sumen ne restas indiferenta al la Internacia Lingvo.

En 1905 grupo da entuziasmaj esperantistoj, inter kiuj Ilija Silvestriev, Donĉo Kolev, d-ro Nikola Blaŝkov, la instruistinoj Careva Dobрева kaj Anastasia Radeva, Ksenofon Jankov kaj aliaj fondas societon „Vekiĝo“. Sumen okupas gravan lokon en la bulgara Esperanto-movado kaj fariĝas ĝia centro dum la komenca periodo.

Tiu rimarkinda kaj ĝoja evento — la 80-jara datreveno de „Vekiĝo“, kunvenigis fine de junio 1985 en la Urba Sindikata Domo multajn geesperantistojn kaj civitanojn. Ĉeestis veteranoj de la E-movado partoprenintaj la kontraŭfaŝisman batalon, reprezentantoj de multaj E-societoj el aliaj loĝlokoj.



Solena celebrado de la 80-jara jubileo de E-societo „Vekiĝo“ (Ŝumen).

En sia raporto Cvjatkto Stojanov, prezidanto de societo „Vekiĝo“, parolis pri ĝia 80-jara vojo kaj pri evoluo de la E-movado en Ŝumen-distrikto. Li substrekiis la multjarajn progresemajn tradiciojn de la loka esperantistaro, kiujn sekvas ankaŭ la nuna E-generacio,

parolis pri la heroo vivo de la antifaŝistoj-esperantistoj — Vela Piskova, Avgust Popov, Vasil Jovčev, Ivan Kânev k. a. Li notis la kontribuon de la ŝumena esperantistaro por stabiligo de la paco, por amikeco, por disfamigo tra ĉiuj kontinentoj de la beleco kaj atingoj de la historia Ŝumen-regiono.

La reprezentanto de CE de BEA Violin Oljanov, salutante la membrojn de la societjubileulo, bondeziris al la veteranoj fortojn kaj energion en ilia nobla E-agado, kaj al la novaj esperantistoj, al la junularo — esti indaj daŭrigantoj de la progresemaĵoj tradicioj. Varmajn salutvortojn direktis al la ĉeestantoj ankaŭ la vicurbestro Bogomil Pârvanov — en la nomo de la Komunuma Komitato de BKP kaj la Komunuma Popola Konsilantaro, Slav Aleksandrov — sekretario de la distrikta komitato de Patrolanda Fronto kaj reprezentantoj de multaj landaj societoj.

Esprimo de la vastaj internaciaj kontaktoj de la ŝumenaj esperantistoj estis la multnombraj gratulleteroj, telegramoj kaj donacoj de esperantistoj el la ĝemelurboj Herson (USSR), Magdeburg (GDR), Debrecen (Hungario), Ustinad Labem (ĈSR) kaj el multaj aliaj landoj. Kiel signo de rekono de ilia kontribuo al la pacbatalo, la prezidantino de la Komunuma Komitato por Defendo de la Paco Slavejka Aleksieva transdonis al la societanoj la Oran Insignon de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco. Per la honora insigno de CE de BEA estis distingitaj la veteranoj Atanas Bojaĝiev, Ivan Smokov kaj Cvjatko Stojanov. Ankaŭ aliaj aktivuloj estis distingitaj per oraj kaj arĝentaj insignoj.

Oni metis florkronojn antaŭ la monumentoj de Vela Piskova kaj Avgust Popov. La gastoj vizitis ankaŭ la majestatan monumenton de l'fondintoj de la bulgara ŝtato.

C. IVANOV

„Radio“ — 75-jara

La 27-an de oktobro 1985 estis solene celebrata la 75-jara jubileo de E-societo „Radio“ en Pazarĝik.

En la granda halo de la Distrikta Junulara Domo ĉeestis pli ol 400 personoj: geesperantistoj kaj gastoj el Pazarĝik kaj la distrikto kaj el multaj aliaj loĝlokoj de la lando. En la honora prezidantaro estis reprezentantoj de soci-politikaj kaj kulturaj institucioj en Pazarĝik.

En sia festa parolado la prezidanto de Distrikta Estraro de BEA Petko Arnaudov atentigis pri la plej gravaj momentoj en la 75-jara vivo de la societo. „Radio“ estas inter la unuaj esperantistaj societoj en la lando, kies agadon partoprenadis sciamaj progresemaĵoj intelektuloj, junuloj kaj laboristoj el la urbo. Tiu ĉi esperantista fajrujo dum la jaroj fariĝis grava kultura kaj socia faktoro en la urbo. Multaj membroj de „Radio“ estis en la unuaj vicoj de batalantoj kontraŭ faŝismo kaj multaj el ili pereis en tiu kruela batalo.

Ekde sia fondiĝo la societo agis ne izolate, sed kunlabore kun aliaj sociaj institucioj, pro kio la tuta urba loĝantaro kaj ĉiuj institucioj rilatis kaj nun rilatas al Esperanto kaj al la esperantistoj kun simpatio kaj estimo.

Pro sia varia, ampleksa kaj vigla agado societo „Radio“ fariĝis unu el la bastionoj de la bulgara Esperanto-movado: en la urbo estis eldonata esperanta literaturo (far Dimităr Tugarov); en „Radio“ aktivadis la nuna vicprezidanto de la Esperanto-Akademio, la pazarĝikano prof. d-ro Stojan Guĝev, prof. Cvetan



D-ro Ivan Čunčev, prezidanto de „Radio“, malfermas la jubilean kunvenon

Stajkov, la fama bulgara arkitekto Aleksandăr Kurtev kaj multaj aliaj elstaraj agantoj de nia soci-politika kaj kultura vivo; la societo estis dommaŝto de naciaj Esperanto-kongresoj kaj aliaj aranĝoj; multaj el ĝiaj aktivuloj gajnis unuajn premiojn en Esperanto-konkursoj; du el ĝiaj membroj (Ivan Vasilev kaj Petko Arnaudov) estas la solaj bulgaroj-kunfondintoj de MEM (Mondpaca Esperantista Movado), multaj societanoj pereis en la antifaŝista batalo.



La Honora Insigno de BEA al Ivan Vasilev

Dum la solena ceremonio Violin Oljanov, reprezentanto de CE de BEA, dekoris per la Honora Insigno de BEA Ivan Vasilev, Stojan Tanev, Krăstju Ĉergarov, Kosta Konstantinov, Georgi Spasov, Nikola Ĉărcarov, Angel Vacev; per la Ora Insigno de BEA — 12 societanojn: Petko Arnaudov, d-ro Ivan Ĉunĉev, Rosica Georgieva, Kostadin Genĉev, Magdalina Georgieva, Panajot Demirev, Rodosto Pavlov, Vasil Kacarov, Spas Zlatanov, Atanas Bonev, Metodi Dimitrov, Ilka Nikolova; per la Arĝenta Insigno de BEA: Grozdenka Filipova, Katja Palešnikova, Maria Ĥristova, Atanas Dimitrov, Ljudmila Arnaudova.

Kun granda kontenteco estis akceptita la Honora Ora Insigno de Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto — por la societo kaj por la societaj aktivuloj Stojan Tanev, Panajot Demirev, Petko Arnaudov, ankaŭ la Ora Insigno por Stojan Damjanov, Kostadin Genĉev, Tonka Dobрева kaj Magdalina Georgieva — fare de Filip Serafimov, sekretario de DK de Patrolanda Fronto.

Kun ĝojo estis akceptita la dekoracio fare de Nacia Packomitato per honoraj oraj insignoj de Ivan Vasilev kaj Petko Arnaudov, kaj per arĝentaj — de Magdalina Georgieva, Metodi Dimitrov kaj Kostadin Genĉev.

La belartan programon partoprenis la Hiruso de Instruistinoj en Pazarĝik, kiu jam estas esperantigita, la laŭreato de Dimitrov-premio Rene Jordanova el la opero de Stara Zagora, la merita artisto, laŭreato de internaciaj konkursoj — Veselin Damjanov, la opereta artistino el Ruse Jana Ĉikalova, la kantistino Maria Angelova.

Per florkrono estis dekorita la monumento de Georgi Stefanov — fondinto de la Laborista Partio en Pazarĝik.

Petko PETROV

AMIKA EKSKURSO EN ĈSSR

La 6-an de oktobro 1985 15-persona turista grupo el la Sofia E-societo „Kosta Penev“ forveturis al Ĉeĥoslovakio laŭitinere: Bukareŝto—Budapeŝto—Koŝice—Poprad—Bratislava. En la hungara ĉefurbo ni restis unu tagon kaj en la tri slovakaj urboj — po tri tagojn. Celo de nia alilanda vojaĝo estis konatigi kun la slovakaj kaj ĉeĥaj esperantistoj, kun la naturbelajoj, materiala kaj spirita kulturo, socialismaj atingajoj kaj E-movado en ĈSSR kaj aktive praktiki la lingvon. Ĉi-somere pli ol 300 slovakoj gastis ĉe samideanoj el Kubrat kaj dum certa tempo feriadis ĉe la Nigra Maro.

Post nia reveno estas malfacile por ni esprimi ĉiujn neforgeseblajn emociojn kaj impresojn. La slovakaj gastamo estas fame konata kaj ankaŭ ni ĝuis ĝin.

La vicprezidanto de Slovaka Esperanto-Asocio ing. Milan Zvara el Poprad sciencnivele konatigis nin kun la persistaj klopodoj de la regionaj aŭtoritatoj por konservi kaj purigi de la aero, akvo kaj nutraĵproduktoj. El sia kolekto de pli ol 4000 natursciencaj lumbildoj li projekciis al ni multajn el ili kaj tiamaniere pliriĉigis niajn konojn pri la beleaga slovakaj naturo.

Ni ne nur trarigardis multajn vidindaĵojn de Koŝice, Poprad, la Altaj Tatroj kun la Muzeo de la Tatra popola parko kaj Bratislava, sed ankaŭ ĉeestis la kunvenon de la Esperanto-Klubo en Koŝice, gvidata de la energiplena juna ing. Duŝan Kafka. Decembre de 1984 la Klubo celebris sian 60-an datrevenon.

Plej multajn membrojn havas la E-klubo en Koŝice, Praha, Bratislava, Poprad, Jilina, Nitra, Prešov. En Slovakio aktivas 68 E-grupoj kun 2300 membroj, en Ĉeĥio — pli ol 3000 membroj. Ekde 1983 en Slovakio funkcias Kleriga Centro, zorganta pri la korespondaj kursoj, intensaj kaj duonintensaj kursoj kaj someraj lernejoj. Dum 10 semajnoj oni instruas Esperanton (sabate — 4 horojn, dimanĉe — 8 horojn) kaj la rezultoj estas kontentigaj — la gekursanoj sufiĉe bone parolas la Internacian Lingvon.

La posedo de Esperanto en Slovakio estas altnivela.

Ĉie dum nia ekskurso tra Ĉeĥoslovakio ni trovis bonkorajn Esperanto-amikojn, al kiuj ni tutkore dankas pro ilia varma gastamo.

Asen JOSIFOV

ABONU, ABONIGU LA ESPERANTO-GAZETON „P A C O“!

Ĝi aperas 6-foje jare plus 4—6 naciaj numeroj. Senpaga specimeno tuj sendota. Kaptu la okazon! Pro la Jaro de Paco la redakcio DONACOS AL ĈIU NOVA ABONANTO po tri jam aperintajn numerojn de la gazeto. Abonu tuj ĉe la landaj perantoj aŭ laŭ adreso: „PACO“, SOFIO 1000, PK 66, Bulgario.

EMOCIA RENKONTIĜO

Iun vesperon, post laciga partopreno en diversaj aranĝoj el la programo de la 70-a UK de Esperanto en Aŭgsburgo 1985, grupeto da bulgaraj esperantistoj ĝis noktomezo babildis, dividis impresojn, travivaĵojn.

— Ĉu vi scias, ke en Aŭgsburgo loĝas la filino de Zahiari Stojanov? — demandis iu el niaj samideaninoj.

Tio estis vera surprizo kaj ni unuanime decidis viziti ŝin la sekvan tagon. Kun emocio ni premis la sonorilbutonon de ŝia apartamento — ja ĉiu bulgaro scias, kiu estas Zahiari Stojanov — memuaristo de la Aprila Ribelo 1876, organizanto kaj inspiranto de la Unuiĝo de Bulgario en 1885, reprezentanto de la plej brilaj demokratiaj kaj kulturaj tradicioj de sia tempo.

Nin gastame bonvenigis maljunulino kun karakteraj bulgaraj vizaĝtraĵoj. Nia interparolo komenciĝis facile kaj senglene.

— Nun, kiam mi staras sur la sojlo de mia centjariĝo, mi volus rememori ĉion travivitan. Mi naskiĝis en Ruse. Tie mi lernis, poste venis en Munkenon, en pensionaton — tiam mi estis 17-jara junulino. Ja tia estis la tiama modo. Kiaj junaj oraj jaroj estis! En dancvespero mi konatiĝis kun mia edzo, ni kreis familion kaj mi restis ĉi tie. . . Mi estas feliĉa, ke mi ĝisvivis la aĝon de 95 jaroj. La pliparton de ili mi pasigis en alilando, sed mia patrolando Bulgario ĉiam estis tre kara al mi. . .

Kaj vere, en ŝia malgranda loĝejo ni vidis brili la varmajn kolorojn de bulgaraj teksaĵoj, sur la muro, en kadro — eterne verda bulgara arbaro, la monumento de Sipka, fotoj de Zahiari Stojanov kun lia tuta familio. . .

— Jen tio ĉi estas albumo kun fotoj faritaj dum miaj vizitoj en Bulgario. Kiam mi estis en Bulgario lige kun la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, al mi proksimiĝis knabineto kaj ligis al mi ruĝan junpioniran kravateton. Kun amo mi rememoras la ĉarmajn bulgarajn infanojn! Tiam mi vizitis Plovdiv, Kazanlâk, Ruse, Sliven Panagjuriŝte. . . Unu monaton antaŭ la libero. Mi havas unu filinon — Hilda. Kaj du nepojn. Mi instruis al ili la bulgaran lingvon. . . Mia edzo estis inĝeniero. La faŝistoj pafmortigis lin en Dahau. Ĉiuj homoj en la mondo devas levi voĉon por justeco

kaj paco, por sia estonto. Kaj sen paco ne estas vivo, ne estas literaturo, kulturo, arto. La vera kulturo ĉiam servis al la paco. . .

— Vidu! Tie, ĉirkaŭ mi, ĉio estas bulgara. Kiel feliĉa mi estus denove viziti mian naskiĝurbon Ruse, kaj Medven kun la blua riverprofundejo. Tie ĉi mi havas multajn bulgarajn kantojn. Al mi tre plaĉas „Bela estas vi, arbaro“.

Si ankoraŭ ne estis findirinta, kaj ni ĉiuj jam ekkantis la kanton pri la bela bulgara arbaro. Poste viciĝis aliaj. . .

La horoj pasis rapide, kaj ni ĉiam ankoraŭ ne emis adiaŭi ŝin.

Ni dankas al vi, kara Zahiarka Stojanova, pro via gastamo, pro tio ke vi konservis tiom da amo al ĉio bulgara.

Mitrofan VELEV,
ĉefredaktoro de g. „Botevgradski Plamâk“

Bona komenco

La Dua Nacia Konferenco de la Esperanto-Sekcio de Filatelistoj ĉe BEA okazis la 16-an de novembro 1985 en urbo Bankja apud Sofio. Ĝian laboron partoprenis filatelistoj-esperantistoj el Sofio, aktivuloj el la tuta lando kaj ankaŭ gastoj el la centraj estraroj de Asocioj, kiuj havas gvidan rolon en la agado de la Sekcio.

Raporton pri la agado kaj antaŭstarantaj taskoj de la Sekcio faris la provizora prezidanto Ljuben Grozdanov.

La diskutadon pri la raporto partoprenis 9 delegitoj, kiuj faris valorajn proponojn lige kun la estonta laboro.

La gastoj — Minĉo Minĉev el la Asocio de Filatelistoj en Bulgario kaj Bojan Plakidov — sekretario de la Asocio de Numismatoj en Bulgario salutis la konferencon en la nomo de siaj Centraj Estraroj kaj invitis CE de BEA kaj la estraron de la Filatelista Sekcio serĉi la vojon kaj kontaktojn por pli intima kunlaboro en ĉiuj sferoj kaj je ĉiuj niveloj, uzante la solidajn bazojn — kluboj, magazenoj kaj aliaj kreitaj en multaj urboj en la lando.

La konferenco decidis, ke estonte la sekcio estu nomata „Esperanto-Sekcio de Filatelistoj, Numismatoj kaj Kolektantoj“.

B. Plakidov en la nomo de la Asocio de Numismatoj donacis Medalionon emisiitan de ilia Asocio lige kun la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, kiel stimulo por estonta kunlaboro.

La Konferenco elektis novan estraron de la Sekcio.

Draguŝko PETROV



„NIA GRANDA TAGO EN UNESKO...”

estas la ĝusta vojo por popularigo de la E-movado kaj por varbado de novaj amikoj de la Internacia Lingvo inter funkciuloj de UNESKO, por krei kaj profundigi niajn kontaktojn kun la koncernaj naciaj komitatoj pri UNESKO.

— Dum via restado en Sofio vi estis akceptita de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO s-ro Amadou Mahtar M'Bow. Bonvolu rakonti al ni pri tiu renkontiĝo.

— Ĝi daŭris ne pli ol dek minutojn. Mi dankis al s-ro M'Bow pro lia favora eldiro pri Esperanto en lia intervjuo antaŭ la Bulgara Televido. S-ro M'Bow respondis, ke li faris tiun eldiron, profunde konvinkita pri la utila agado de la esperantistoj. „Ĉar — li substrekis, — ili sukcesis krei humanan movadon, kiu servas al la homa interkompreniĝo.

Mi donacis al s-ro M'Bow du miniaturnajn libretojn — ĉiu el ili centpaĝa. En cent lingvoj en ili estas skribita la vorto „paco”. Sed sur ilia helblua kovrilpaĝo tiu vorto estas skribita en Esperanto. La malpli granda el tiuj libretoj havas dimensiojn de 15×15 mm!.

— Vi certe jam estis en Bulgario. Kia vi trovas ĝin nun?

— Mi duan fojon vizitas Bulgarijon kaj, kompreneble, mi ligas mian nunan viziton precipe kun la sukceso, kiun ni atingis por la kaŭzo de Esperanto en la XXIII Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO. Sed mi ne forgesos vian Nigran Maron, la belan Plovdiv, kies malnovan parton mi ege ekamis. Min forte impresis Veliko Tŕrnovo per siaj situo kaj historiaj monumentoj. Originala estas la arkitekturo de la nova urba centro de Smoljan. Belaj estas la hoteloj kaj ripozdomoj en Pamporovo, la pitoreska rodopa vilaĝo Ŝiroka Laka!...

Kiajn kontaktojn kun bulgaraj esperantistoj vi havis?

— Nenie ĝis nun mi havis tiom multe da aŭskultantoj kiel dum mia renkontiĝo kun sofiaj esperantistoj. Mi parolis ankaŭ antaŭ partoprenantoj en junulara seminario en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. En Bulgario la E-movado estas forta kaj multnombra. Mi dankas al Bulgara Esperantista Asocio pro la kora gastamo.

— Vi estas bone konata en la E-movado kiel vojaĝanto, verkisto, ĵurnalisto, kinodokumentisto, etnografo, poligloto, alpisto, kolekta-

— Pri la Internacia Lingvo mi okupigas jam 56 jarojn. La organizanto de mi vojaĝon tra Amazonio partoprenis kvar personoj, tri el ili estis esperantistoj. Krom ĉio alia, kion ni tiam instruis al la ekskanibaloj, estis ankaŭ unu esperantlingva kanto. Ĉiam dum miaj vojaĝoj mi serĉis kontaktojn kun esperantistoj. Tie, kie mi ne trovis sameanojn, mi „kreis” ilin — mi organizis kursojn kaj fondis societojn, eble pli ol 40. Mi estas aŭtoro de sep libroj originale verkita en Esperanto. Kiel ĵurnalisto mi konstante uzas la Internacian Lingvon. Dufoje mi surgrimpis la plej altajn montopintojn de Sud-Ameriko (Akonkagvo, 7035 m) kaj de Afriko (Kilimangaro, 5895 m). Mi havis la feliĉon vidi Aŭstralion de ĝia plej alta punkto — pinto Kosĉuŝko (2234 m). Sur ĉiujn tiujn lokojn mi lasis flirti la verdstelan Esperantan flagon.

— Konklude mi volus starigi al vi la tradician demandon: viaj estontaj planoj?

— Ĉi-jare mi intencas vojaĝi tra du ĉinaj regionoj: Tibeto kaj la suda provinco Junan. Krome, mi preparas por la E-publiko tradukojn de serio da miaj libroj, en kiuj mi rakontas pri miaj vojaĝoj tra la mondo.

— Mi kore dankas vian afablecon. Sed jen unu lasta peto — ĉu vi konsentus skribi ion por niaj legantoj?

— Plezure — jen mia aŭtografo:

Kore salutas la
legantojn de
*Bulgara Esperan-
tisto*, kun
bondeziroj,
Tibor Sekelj -
17.10.1985.

Intervjuis: Maria BOJAĜIEVA

La esperantistoj el la tuta mondo memoras la XXIII Sesion de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Sofio (8. 10—12. 11. 1985) precipe pro la fakto, ke en ĝi por unua fojo post 1954 oni de-nove parolis pri Esperanto. La Konferenco akceptis rezolucion pri la internacia lingvo Esperanto.

Lige kun tiu grava sukceso mi havis la plezuron intervui s-ron Tibor Sekelj, observanto de UEA en la Sesio.

— S-ro Sekelj, ĉu la delegitoj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO facile konsentis aprobi la proponon pri akcepto de Rezolucio favore al Esperanto?

— La 1-an de novembro 1985 la Ĝeneralan Kunsidon gvidis juna belgo. Vi ja scias, ke Esperanto estas tre populara en Belgio. Li deklaris, ke ĉiuj ĉeestantoj estas konvinkitaj pri la celkonformeco de la Rezolucio. Neniu en la salonego kontraŭstaris aŭ faris iujn ajn rimarkojn. La propono pri Rezolucio, farita flanke de la jugoslava delegitaro, estis akceptita unuanime. Anticipe ĝin apogis la delegitaroj de Bulgario, Pollando, Hungario, Ĉinio, San Marino kaj Kostariko dank' al anticipaj kontaktoj kun la delegitoj de tiuj landoj. Mi havis renkontiĝojn kun pli ol 70 delegitoj de la Sesio. Favoran etoson por akcepto de la rezolucio preparis ankaŭ la E-asocioj en iuj landoj, kiuj sukcesis starigi kontaktojn kun siaj naciaj delegitaroj por la Sesio de UNESKO. Tiu



ĜIS KIAM BATAS LA KORO

Multfoje — ĉu leginte rememorojn pri li, ĉu dank'al la rakontoj de tiuj, kiuj konis lin, ni denove malkovradis la ĉarman figuron de la nelegala laborista funkciulo Ivan Garvanov. Kaj ĉiam ni admiris liajn modestecon kaj mirindan aŭdacon, la kredon je la klasa pureco de nia komunista partio. Rezigni pri plezuroj de la vivo, senigi je hejmo kaj parencoj en la nomo de plej helaj ideoj — tio ne estas simple heroaĵo. Tio estas triumfo de la heroaĵo egala al majesteco.

Eble tio provokis ĉe ni la deziron konatigi kun la manuskripto de la memuarlibro de Vera Garvanova „Ĝis kiam batas la koro...“¹ De ĝi ni eksciis multajn novajn faktojn pri la homo, al kiuj la laboruloj-ministoj el Pernik kaj nia tuta popolo multon ŝuldas. Simpla, senpretenda estas la rakonto de Vera Garvanova — la vivkunulino kaj kunlaborantino de Ivan Garvanov — pri la vivovojo de tiu eksterordinara homo kaj revoluciulo — ekde lia infanaĝo ĝis la fatala momento, kiam li aŭdas la raŭkan „Stop!“ de la persekutantaj lin policanoj...

Krom sia revolucia agado, Ivan Garvanov ekposedas Esperanton kaj estiĝas ĝia flama adepto. Ĉi-sube ni proponas fragmenton el la libro.

Fine de oktobro (1931) la Subdistrikta Estraro de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS), kunvokis konferencon en la loĝejo de la junkomunisto Todor Pamukĉiev, karbofosisto en la minejo „Starite Rudnici“. Alvenis delegitoj el la urboj Pernik, Radomir kaj Breznik kaj el la vilaĝoj ĉirkaŭ ili. Ivan Garvanov raportis pri la ĝisnuna agado, emfazante la aktivecon de la junkomunistoj. Mi memoras — li parolis plejparte, ke ni bezonas pli grandan memstarecon kaj iniciatemon por esti pli proksime al la streboj de la laborista klaso kaj krome, ni ne timu la neeviteblajn malfacilaĵojn sur nia vojo. Ni forlasis la malriĉan loĝejon kun la sento, ke la organizo hardiĝas. La sekretario de la komsomola organizo sugestis al ni memfidon kaj ni estis pretaj partopreni novajn publikajn elpaŝojn.

Kaj tiuj elpaŝoj sekvis unu post alia. Nur post kelkaj monatoj Ivan Garvanov gvidis nin al nova kolizio dum la balot-kampanjo. Por la komunista partio en Pernik voĉdonis mil ducent elektantoj. Kaj en februaro 1932 en la komunuma konsilantaro estis elektitaj la malnovaj komunistoj onklo Ferdo, Georgi Ĉolakov, Jordan Peŝev, Dimitar Popov. La polico blokis la Iglev-kvartalon, ĉar ĝuste tiu nia „Ruĝa Sanhajo“ plej multe kontribuis por la venko. La revoluciaj fortoj en la urbo jubilis. Jubilis ankaŭ nia sekretario — ja lia destino estis ne resti senokupa!

En la subtera infero² de Pernik ŝtonkarbon fosis centoj da junuloj el la urbo, el la ĉirkaŭaj vilaĝoj, el la tuta lando. La plejparto da ili laboris en la maŝin-priservado kaj en la metiistaj laborejoj. La labortago daŭris 16 horojn, ĉe mizera tagsalajro. Kaj tamen la laborantoj estis en pli bona situacio ol senlaboruloj, kiuj fosis en la apudaj „montetoj“ de minejrubo por trovi pecetojn da nigrebrila ŝtonkarbo.

Ivan Garvanov bone komprenis la bezonojn de la nova laborista generacio kreskanta en nia urbo — ja li mem apartenis al ĝi. Li konis la batalojn de la minlaboristoj. Sed iuj el la junuloj neble memoris pri ili, aliaj konis fragmente kaj multaj nenion sciis. Tial li serĉis la ponton, kiu interligu nin kun la gloriĝantaj tradicioj de la minlaboristoj. Tiel naskiĝis lia ideo pri kreo de laborista „universitato“ pri marksismo-leninismo. La kunvenoj okazis en la hejmoj de Jordan Kostov, Jordan Peŝev, Mitko Sokolov, Georgi Ĉolakov. Iom poste ni havis eblecon transformi en nian klubojn la malriĉan ĉambron de Josko Ivanov — la Gladisto kaj Ivan Kozarev — la Razisto. Duonkaŝita inter la malaltaj dometoj sur la maldekstra bordo de rivero Strumo, ĝi gastame akceptis nin vespere, kiam la urbo silentiĝis. Ĉi tie multaj el ni por la unua fojo aŭdis pri Marks kaj Engels, pri la vivo kaj agado de Lenin, pri tio, kion kreas per sia laboro la homoj en la unua ŝtato de laboristoj. Dank'al la proksimeco de la ĉefurbo ĉe ni ofte venis elstaraj lektoroj. Sed ankaŭ la lekcioj de Ognjan Stankov — rava revoluciulo kun kristale klara penso, de Borislav Peŝev, Stojan Milenov vekis grandan intereson. Ili ligis la sciencan komunismon kun la batalplena pasinteco de Pernik, kun ĝiaj nuntempo kaj estonteco. Ili konigis al ni la vivojn de la granda filo de Bulgario — Georgi Dimitrov kaj de la minlaborista gvidanto Temelko Nenkov. Fortan impreson faris al ni la lekcio de Ivan Garvanov pri la soci-ekonomiaj formacioj. Emociite ni aŭskultis, ke ĉi tie, sur tiu loko apud nia kvietita Strumo kaj apud la impona „Kakra-fortikaĵo“, en la randaj kvartaloj kaj apud la minejoj vivis la primitiva homo, kaj ke ĉi tie vivas ankaŭ la homoj el la epoko de komunismo. Tio entuziasmigis nin. Fiere ni ripetis la frazon: „La proletaro estas tombofosisto de l'kapitalismo“. Kaj Ivan Garvanov estis senlaca. Post ĉiu lekcio li postulis de ĉiu el ni raporton pri la farita laboro kaj komisiis al ni novajn taskojn. La ĵurnaloj „Mladejka Iskra“, „Eljo“, „Jupe1“, „Pogled“ transiradis de homo al homo.

Tiutempe Ivan Garvanov alportis la libron „Fundamentoj de la Leninismo“ en Esperanto-traduko. Li tradukis ĝin en bulgarian lingvon kaj por ni ĝi fariĝis verko por ĉiutaga legado. Krom tio ni fondis laboristan Esperanto-grupon. En ĝi la plimulto estis teknikistoj kiel Spiro Nedjalkov kaj Georgi Idakiev, estis ankaŭ metiistoj — la razisto Stojan Krivobarski k. a. Tiam mi eĉ ne supozis, ke tiu grupo transformiĝos en unu el la unuecfroantaj rondetoj. Kaj Ivan Garvanov fariĝis pasia esperantisto. Ni kune lernis la lingvon de d-ro L. L. Zamenhof, pli malfrue ni instruis tiun lingvon ankaŭ al nia infano. Ni korespondis plejparte en Esperanto, kiam Ivan Garvanov estis lernanto en Sofio, soldato en la armeo, laboristo en vilaĝo Marijno (distrikto de Stara Zagora). La tradukita de li broŝuro „La esperantista traktoro“ vekis nian intereson al la sopirataj kolhoz-kampoj de Soveta Unio. La malgranda E-vortareto ĉiam sidis en la interna poŝo de lia jako — iom ĉifita kaj deformita, tie ĝin trovis la polico, kiam li pereis en sia lasta batalo.

Tiamaniere, riĉigita per la „Fundamentoj de Leninismo“, nia universitato pri sciencia socialismo funkciis jen trankvile, jen en vervaj diskutoj. Nia povra persekutata „universitato!“ Ni memoras ĝin kiel nia valorega posedajo — ĝi kreis revoluciulojn, kiuj sciopovis defendi sian mondkoncepton. Kompreneble, ankaŭ la memklerigado en tiuj jaroj estis danĝera.

Vera GARVANOVA
Esperantigis: Canko MURGIN

¹Ĝis kiam batas la koro“ — biografia libro pri la vivo kaj agado de Ivan Garvanov, revoluciulo, sekretario de la komsomola organizaĵo (Jun-Komunista Asocio) en urbo Pernik kaj esperantisto. Il eldono, bulgarlingva, Sofio, 1983.

²Subtera infero — temas pri la karbominejo — Noto de Red.

IVAN KRESTANOV SKRIBIS AL JANIS RAINIS...

Dediĉita al la bulgara esperantistaro



Janis Rainis —
medalo. Bronzo.
Foto: J. Strupulis

Bulgaraj turistoj, estante en Rigo, verŝajne vizitis la Muzeon de Literaturo kaj Arthistorio je la nomo de J. Rainis, kiu troviĝas sur la bordo de Daugava, en la nuna Pionira Palaco, kaj certe konatiĝis ankaŭ kun ĝia ekspozicio. Tiu ĉi muzeo konservas personajn arkivojn de konataj latvaj kulturagantoj, verkistoj, artistoj, komponistoj. Ĉefan lokon en ĝi okupas la persona arkivo de la Latva popola poeto Janis Rainis (1865—1929). Multaj aŭdis pri lia favora rilato al la internacia lingvo Esperanto. Konataj estas liaj versaĵoj tradukitaj en tiun ĉi lingvon. Sed nur kelkaj scias, ke en lia persona arkivo troviĝas du korespondadoj de la bulgara Esperanto-pioniro Ivan Krestanov (1890—1966).

La unuan leteron Iv. Krestanov sendis al J. Rainis (ili ambaŭ tiutempe loĝis en Svislando — M. B.) la 27-an de oktobro 1919. Ĝi estis skribita en la ĝermana lingvo, sed rilatis al Esperanto:

Iv. Krestanov sciigas al J. Rainis pri l'apero de lia libro „El la Proksima Oriento“ (aldone 1 ekz. de ĝi) kun eseoj pri Ukrainio, Litovio, Belorusio, Latvio, Estonio, Finnlando, Tatario kaj Kartvelio. Li volas popularigi tiujn ĉi malmulte konatajn landojn. Ĉar la centro de UEA troviĝas en Berno, kaj ĝi havas delegitojn kaj membrojn en la tuta mondo, estus celkonforme eseojn traduki en etnajn lingvojn. Kelkaj el la menciitaj landoj jam mendis 100 ekz. de la broŝuro je 250 frankoj. Iv. Krestanov proponas al J. Rainis fari same.

Al tiu ĉi letero J. Rainis respondas la 5-an de januaro 1920 el Svislando. En lia persona

arkivo konserviĝas malneto de la letero, per kiu li konfirmas la ricevon de la broŝuro kaj aldonas:

„Mi iam malmulte interesiĝis pri Esperanto. Mi konsideras ĝin la plej aristokrateca helpiligo, kompare kun kiu Ido estas nur surgato. Tamen mi ne sukcesis ĝin ekposedi.“

Poste Iv. Krestanov skribas al J. Rainis (kiu jam revenis Latvion) la 6-an de junio 1920, dankas pro la ricevitaĵo 250 frankoj kaj sciigas, ke li intencas reveni Bulgarijon.

La libron „El la Proksima Oriento“ I. Krestanov dediĉas al: „Nia plej grava organizaĵo Universalas Esperanto-Asocio kunliginta idealon kaj realon“.

En la eseo pri Latvio Iv. Krestanov skribas pri ĝia geografio kaj historio. Sekvas trarigardo de la latva literaturo komence de folkloro kaj ekleziaj libroj ĝis beleto. Estas menciitaj nomoj de latvaj verkistoj kaj unu pago estas dediĉita al la latvaj gepoetoj J. Rainis kaj Aspazija (lia edzino), kiuj ambaŭ loĝas en ekzilo en Svislando. Li skribas ankaŭ pri iliaj dramverkoj aldonante iliajn titolojn latve kun la apuda traduko en Esperanto. Ĉio estas verita sincere, kun grandaj simpatioj.

Ekestis amaso da demandoj: I. Krestanov ne scipovis latve, kiu informis lin pri Rainis kaj Aspazija? Kiamaniere Rainis disvastigis la menciitan broŝuron? Kiu aĉetis tiujn ĉi 100 ekz.? Ĉu respondon al iu el la menciitaj demandoj ne kaŝas la persona arkivo de Iv. Krestanov, kiu troviĝas en la Bulgara E-Muzeo en Sofio? Ĉu iu el bulgaraj gesamideanoj ne emus esplori la aferon?

Per eseo pri Latvio Iv. Krestanov eniris ankaŭ la latvan kulturan historion, ĉar ĝi estas la unua ĝis nun konata publikaĵo en Esperanto pri tiu ĉi temo.

Interesa kaj signifoplena por latvaj kaj bulgaraj esperantistoj estas tiu ĉi kontakto de du elstaraj personecoj — J. Rainis kaj Iv. Krestanov.

Mirdza BURGMEISTER

NOVAJ TASKOJ ANTAŬ LA SOFIA LITERATURA RONDO

La 4-an de novembro 1985 la Sofia Literatura Rondo de verkemaj esperantistoj havis sian unuan kunvenon post la forpaso de ĝia gvidanto — la karmemora merita E-veterano Asen Grigorov.

La ĉeestantoj prezentis sin al la nova rondgvidanto — la talenta juna ĵurnalistoj kaj verkisto Georgi Mihalkov, pridiskutis sian pasintan kaj estontan aktivadon. Ili akceptis laborplanon, plenumendan ĝis la fino de junio 1986. Oni antaŭvidas renkontiĝojn kun bulgaraj verkistoj, kies verkoj estas tradukitaj en Esperanton, spektadon kaj pridiskutadon de teat-

rafoj, periodan aperigon de propra Literatura Informilo, starigo de kontaktoj kun alilandaj E-verkistoj.

La sekretario de la Literatura Rondo Stefan Sokolov kaj la rondanino Rajna Arnaudova, kiu dum pluraj jaroj sindone tajpas kaj multobligas la proponatajn por pridiskutadon verkojn, promesis ke ili ankaŭ estonte ne ŝparos fortojn, konojn kaj sperton por plua aktivigo de la rondo.

Ni varme apelacias, precipe al junaj verkemuloj, nepre aliĝi al nia beletra rondo, kiu okazigos siajn kunvenojn la unuan lundon de ĉiu monato en la Centra Domo de Instruistoj, strato Parensov 11, je la 17-a horo.

A. J.

NEFORGESEBLA TAGO

(Lige kun la 81-a naskiĝtago de Trifon Ĥristovski)

Neniam mi estus kredinta, ke mia revo, mia deziro persone viziti la domon en la vilaĝeto Radotina, kie Trifon Ĥristovski, la elstara bulgara komunisto, verkisto kaj esperantisto naskiĝis, vivis kaj mortis, realiĝos tiom rapide. Tio eble sonas iomete bombaste, sed de post kiam mi konatiĝis kun la membiografio „Mia vivo“, verkita de li en la jaroj 1941/42, mi estis tiom impresita pri la sorto de Trifon, ke mi legis ĝin trifoje. Mi interesiĝis pri ĉio rilate al lia vivo.

Jen nova fakto aperis: en la postlasaĵo de nia esperantisto Walter Dietze (esp. Valter Dice) el Leipzig oni trovis en 1984 interalie 17 leterojn, skribitajn de Trifon al li en la jaroj 1929 ĝis 1931. Tiuj leteroj estas tre interesaj, ĉar Trifon estis komunisto kaj Walter Dietze socialdemokrato. La leteroj estas bona suplemento al la biografio de Ĥristovski kaj donas al la leganto klaran imagon pri liaj personeco, klereco, batalemo kaj modesteco. Ĝis tiam Trifon Ĥristovski estis por mi nur elstara, aminda kaj admirinda homo kaj kamarado el Bulgario, sed nun — pere de korespondado — mi trovis ekzemplon de laborista interkomunikado inter niaj landoj, ekzemplon de internacia klasbatalo, pecon de komuna laborista historio.

La estraro de nia asocio, konante mian intereson al la vivo de Trifon, komisiis al mi prilabori la korespondataĵojn inter Trifon Ĥristovski kaj Walter Dietze. Sed la leterinterŝanĝo ne estas kompleta, ĉar mankas leteroj de Dietze al Ĥristovski. Oni ja povas elpensi la enhavon de la mankantaj leteroj, sed tamen tio ne sufiĉas.

Kiel reprezentanto de GDREA en la 41-a kongreso de BEA en julio 1985, mi havis eblecon trovi neforgeseblajn momentojn. Mi neniam forgesos la 9-an de julio 1985, kiam mi staris en la ĉambro de Trifon kaj miaj okuloj malsekiĝis pro emocio!

La 9-an de julio en la kancelario de CE de BEA atendis min agrabla surprizo. Enirinte la ĉambron, mi vidis kolonelon de la Bulgara Popola Armeo — altstaturan grizharan viron kun simpatiaj vizaĝtraĵoj. Oni prezentis lin al mi: Dimitro Ĥristovski, la plej juna frato de Trifon! Tion mi ne atendis! Oni estis invitintaj lin veturi kun mi al Radotina. Bedaŭrinde Dimitro ne posedas Esperanton, tial nia akompanantino el BEA Stefka Ĉenkova devis interpreti. Dimitro Ĥristovski estas afabla, aminda kaj modesta viro, kiun mi — laŭ germana esprimo — tuj „enŝlosis en mian koron“. Ni ankaŭ konstatis, ke ni ambaŭ estas samĝaj. Ni triope ekveturis norden al Radotina.

Alveninte en la naskiĝlokon de Trifon, Dimitro kondukis nin al la gepatra domo kaj malfermis ĝin. Kiom konata ĉio ĉi estis por mi, kvankam mi neniam estis vidinta la lokon: la malvasta korto, la malgranda ĝardeno, la malaltaj kaj primitivaj ĉambroj, la rivereto Rudarka, sur kies bordo Trifon ofte ludis, la jam sekigita mueleja kanalo, en kiu la eta fratino Velka dronis, la kruta ligna ŝtuparo. Ĉion ĉi mi konis el la membiografio de Trifon, sed kia diferenco: vidi tion propraokule! Dimitro montris al mi ĉion. Mi estis forte emociita pri tio kiamaniere la kamparanoj iam vivis. Vidinte tiujn kadukajn, malhelajn kaj primitive meblitajn ĉambrojn, mi sentis la tutan mizeron de la iama vilaĝa loĝantaro kaj multe pli bone komprenis, pri kio Trifon skribis en siaj libroj kaj leteroj.

Fine mi staris en la ĉambro, en kiu Trifon pli malfrue loĝis. Mi vidis lian bibliotekon, fotojn pri li, pri la gepatroj kaj aliaj, faksimilojn de leteroj ktp. Bedaŭrinde mi ne havis sufiĉe da tempo por kontempli ĉion, ĉar mi jam posttagmeze estis ekflugonta el Sofio al Berlino. Pro tio mi nur supraĵe povis rigardi ĉion ĉi, meti florojn sub la portreto de Trifon kaj enskribi min en la memorlibro por gastoj. Volonte mi estus restinta pli longan tempon! Sed mi scias, ke iutage mi denove staros tie, kaj tiam mi havos sufiĉe da tempo.

Manfred ARNOLD, GDR

HONORADO DE ESPERANTO-INSTRUISTOJ

Ciujare okaze de la Zamenhof-tago CE de BEA aljuĝas honortitolojn al Esperanto-instruistoj, kiuj dediĉis sin al kursgvidado kaj instru-aktivado, distingiĝis kiel bonaj metodikistoj kaj pedagogoj kaj atingis signifajn rezultojn. Ci-jare, malgraŭ la memorigo fare de la instrukomisiono ĉe CE de BEA, la DE subtaksis tiun moralan stimulan kaj ne sendis proponojn. Kompreneble, ne en ĉiu distrikto estas tiaj distingitoj, oni devas bone pritaksi la kvalitojn kaj la meritojn, tamen en iuj lokoj troviĝas tiaj entuziasmaj kaj rezultohavaj instruistoj, kiuj restas nerimarkitaj de la estraroj.

Pro tio la instru-komisiono kun la helpo de la estraroj de la filologia kaj la instruista sekcioj ĉe BEA devis mem pristudi laŭ sia ebleco kaj pridiskuti la atingojn de plej bonaj Esperanto-instruistoj kaj konforme al § 4 de la Regularo pri Aljuĝo de Titoloj al Esperanto-Instruistoj plenumis sian devon kaj faris proponojn.

La Buroo de CE de BEA en sia kunsido la 25-an de novembro 1985 aljuĝis honortitolojn al jenaj fervaraj Esperanto-instruistoj:

I. Titolo „Elstara Lektoro“ —
Neno Janev el Gabrovo.

II. Titolo „Rekonita Lektoro“ —
1. Nedka Valjaviĉarska el Sofio
2. Emilija Kanjovska el Pleven
3. Saŝa Nedeva el Varna

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“, la instrukomisiono ĉe CE de BEA kaj la estraroj de la filologia kaj instruista sekcioj elkore gratulas la honoritajn instruistojn kaj bondeziras al ili pluajn sukcesojn en ilia nobla aktivado!



VALORA VERKO PRI DIMITROV

Ljuben Stanev: La glacikovrita ponto. Romano. Trad. Asen Grigorov, Red.: Prof. d-ro Gtojan Ĝuĝev. Eld. Sofia-Press, 1984.

La esperantlingvaj libroj, eldonataj de Sofia-Press, estas ĉiam bone elektitaj — la bulgaraj legantoj-esperantistoj, dezirante konatiĝi kun la Esperanto-traduko, povas relegi rimarkindajn verkojn, kaj la eksterlandaj esperantistoj havas eblecon pli bone ekkoni ne nur la bulgaran literaturon, sed ankaŭ momentojn el la herooa historio de la bulgara popolo, el ĝia nuntempo aŭ ekscii ion pli pri la vivo kaj agado de la plej elstaraj filoj de Bulgario.

„La glacikovrita ponto“ ne estas scienc-historia verko, nek aŭtobiografio, sed romano, en kiu ĉefa figuro estas la granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov.

Bulgarlingve aperis multaj beletraj verkoj pri la vivo de Georgi Dimitrov. Aperis romanoj, dramoj, poemoj. Multaj aŭtoroj per la rimedoj de la beletro interpretis la neordinaran personecon de Georgi Dimitrov, multaj mont-ris lian firman sintenon dum la Leipzig-proceso. En sia romano „La glacikovrita ponto“ Ljuben Stanev tamen direktas nian atenton al iu ne tre konata momento el la vivo de Dimitrov. Tio ĉi estas la tagoj post la Leipzig-proceso, kiam Dimitrov kaj liaj kamaradoj, malgraŭ ke ili estas senkulpigitaj, plu restas en la malliberejo, kie la hitleranoj sekrete preparas ilian likvidon.

La streĉa atmosfero de la romano donas eblecon al Stanev psikologie kaj profunde priskribi la personecon de Dimitrov. Kvankam malliberigita, sen iu ajn konkreta informo pri sia estonta sorto, Dimitrov restas firma kaj trankvila. Eĉ en la ĉelo li ne ĉesas labori. Li provas starigi kontaktojn kun la ekstera mondo, ĉar li bone scias, ke li ne estas sola. Multaj honestaj homoj en la mondo pensas pri li kaj deziras helpi al li kaj al liaj kamaradoj. Unu el li estas Marta Dodd, filino de la usona ambasadoro en Germanio. Marta amas la junan direktoron de Gestapo Wolf Diks, sed ŝi admiras Dimitrov kaj lian kuraĝon. Pri Dimitrov ŝi diras: „Li estas antaŭ ĉio brava viro, preta akcepti eĉ la morton pro la libereco kaj la justo.“

Stanev karakterizas Dimitrov ankaŭ per la aliaj herooj en la romano. Ekzemple Göring mem, kiu persone preparas la planon por likvido de Dimitrov, diras: „Dimitrov estas homo kun senduba ravo kaj kun talento de denaska popola gvidanto.“

En la romano, krom la personecon de Dimitrov, Stanev tre talentas pentras ankaŭ la portretojn de kelkaj ordinaraĵ germanoj. Unu el ili estas Kluge, la mallibereja provoso.

Kluge fariĝas provoso pro mizero, sed li restas honesta homo, kaj eĉ kaŝe provas helpi al Dimitrov.

Alia interesa figuro en la romano estas Wolf Diks — la direktoro de Gestapo. Diks estas sendube saĝa homo, sed li akceptas servi al la hitleranoj, kaj kiam komprenas, ke li fariĝis peono en iliaj manoj, jam estas tre malfrue eskapi el ilia aranea reto.

Memorinda estas la momento, kiam Diks gvatas Dimitrov tra la observtruo de la ĉela pordo. Tiam Diks komprenas, ke tute ne estas facile likvidi Dimitrov, kaj la leganto havas la impreson, ke ne Dimitrov, sed Diks estas en la mallibereja ĉelo.

La insida hitlera plano likvidi Dimitrov kaj liajn kamaradojn fiaskas.

Ljuben Stanev verkis vere interesan romanon, kiu vekas la atenton de ĉiuj Esperantaj legantoj. Per tiu ĉi romano ili pli bone ekkonos la personecon de unu el la plej elstaraj figuroj en la bulgara historio.

La konata bulgara esperantisto Asen Grigorov klare kaj precize tradukis tiun ĉi valoran verkon.

Georgi MIĤALKOV

MATEMATIKA TERMINARO

Nova faka verko estas tipografie solida, sed ne luksa, ĝia titolo estas MATEMATIKA TERMINARO. Ĝia aŭtoro estas Daniela Deneva kaj la eldonisto — Bulgara Esperanto-Asocio. Amplekso — 160 paĝoj, eldonjaro 1985. En la enkonduko la aŭtorino klarigas la motivon, pro kiu ŝi verkis tiun fak-terminaron, ĉar jam ekzistas du verkoj pri matematikaj temoj, sed la klarigoj estas en eĉ ne unu slava lingvo. Pro tio ŝi verkis matematikan Terminaron, kiu klarigas esperantajn esprimojn en du slavaj lingvoj — la bulgara kaj la rusa. La enhavo estas dividita en 3 partojn. La unua estas esperantaj esprimoj kun traduko en la bulgara kaj rusa, ordigita laŭ la esperanta alfabeto. Sekvas parto bulgara-esperanta kaj rusa-esperanta, tiuj du laŭ la kirillitera alfabeto. Ĉio tre klare presita, tiel ke la orientigo inter multaj terminoj kaj tri lingvoj estas senproblema.

Emilia LAPENNA,
Radio Zagreb — Esperanto-elsendo

Novaj libroj

Ivan Prámov. La kooperativo — disvolvigo kaj eston-teco. Ofsete kaj esperantlingve eldonita broŝuro de la Centra Kooperativa Unuiĝo, 38 paĝoj. Sofio, 1984.

La aŭtoro traktas la ĝeneralajn tendencojn de evoluo de la socialisma sistemo kaj la ĉefajn ŝanĝojn en la kooperativa movado.

Apartan atenton oni turnas al la diversspecaj formoj de kooperativa agado en la socialismaj landoj.

La aŭtoro montras gravajn instruojn pri perfektigo de la gvidado kaj la planado en la kooperativoj surbaze de akiritaj multjaraj spertoj. Li atentigas pri la principoj de kooperativa demokratio, pri internaciigo de la ekonomia vivo kaj precipe pri organizado de kooperativoj en la landoj de la monda socialisma komuneco.

* * *

Cano Ignev. La eduka efektiveco. (Metodologiaj fundamentoj). Bulgarlingva eldono de la Bulgara Akademio de Sciencoj — Instituto pri Filozofio „Akademiano Todor Pavlov“. Sofio, 1985, 197 paĝoj.

La longjara eduka kaj kleriga praktiko de la aŭtoro — elstara bulgara sociaganto kaj esperantisto — rezultis tiun sciencan soci-psikologian esploron. Ĝia celo estas la klarigo de tre gravaj novaj momentoj en la scienco pri socia edukado de la individuo kaj ties efektiveco en la socialisma socio.

La granda valoro de tiu ĉi scienca esploro en la specifa sfero de sociala psikologio kaj socialisma edukado havas kiel ĉefan objekton la kreskadon de harmonie evoluinta personeco en la socialisma socio.

D. S. H.

La frazeologiaj esprimoj kaj Esperanto

La frazeologia esprimo similas al naĝanta en la oceano glacimonto. Same kiel ĝi la frazeologia esprimo konsistas el du partoj: malgranda, videbla — la formo, per kiu la esprimo manifestiĝas, kaj granda, nevidebla — kiu apogas la unuan kaj eksplikas ĝian „naĝadon“. La komunikado realiĝas ne nur per la unua, sed ankaŭ per la dua parto, tiel kiel la glacimonto moviĝas ne nur kun sia videbla, sed ankaŭ kun sia nevidebla parto. La unua parto ne povas paroli sen la helpo de la dua parto. La „nevidebleco“ de la dua parto tute ne embarasas la etnanon.¹ Li konas la duan parton el la „etnolingva kontrakto“, en kiu li partoprenas. Ĉe la prononco de la unua parto de la esprimo, antaŭ la etnano aperas ankaŭ la dua parto kaj la komunikado efektiviĝas. Ekzemple, se iu bulgaro diras: „lia kapo ne boleblas“, ĉiuj bulgarlingvanoj kompenas la komunikon, ĉar laŭ la „bulgarlingva kontrakto“ tiuj venas helpe la neprononcita dua parto de la esprimo kaj klarigas al ili, ke temas pri homo, kiu estas tiom obstina, ke ne sufiĉas eĉ kelkaj ĉaroj da ligno por boligi ties kapon. La alietnianoj, tamen, kompenas nenion el la eldiro „lia kapo ne boleblas“, ĉar ili ne estas partoprenantoj en la „bulgarlingva kontrakto“.

Kiamaniere komunikado, vestita en frazeolo-

gia esprimo, povas esti direktita al alietniano? Se la tradukanto deziras prezenti la komunikon per frazeologia esprimo, li devas trovi ekvivalentan frazeologian esprimon en la lingvo, en kiun li tradukas. Sed se li deziras adresi la komunikon al la alietnianoj pere de Esperanto? Esperanto-etno ne ekzistas. La ofte uzataj esprimoj *Esperanto-popolo*, *Esperantujo* estas nur efektaj esprimoj, stilformoj. Tia estas ankaŭ la esprimo *Esperanta kulturo*. Esperanta kulturo ankaŭ ne ekzistas. Esperanto ne kreas ian apartan specifan kulturon. Esperanto faciligas la rilatojn inter la etnaj kulturoj kaj, nature, ties reciprokan pliriĉigon. Kiam oni tradukas verkojn de Shakespeare aŭ de Tolstoj, la verkoj ne fariĝas eroj de la Esperanta kulturo. Ili restas eroj de la angla aŭ de la rusa kulturo. Eĉ kiam oni verkas originale en Esperanto, ankaŭ tiaj verkoj apartenas al la etna kulturo de ties aŭtoro, tiel kiel, ekzemple, la verko en angla lingvo de la hinda aŭ en portugala de angolano ne estas eroj de la angla aŭ portugala, sed de la hinda aŭ angola kulturo.

La malekzisto de Esperanto-etno, de Esperanta kulturo malebligas „starigon de etnolingva kontrakto“, sur kies grundo nur povus kreski la frazeologiaj esprimoj.

Ĉu tio estas malperfektaĵo de Esperanto? Riproĉi al Esperanto la maleston de frazeologiaj esprimoj signifus riproĉi al ĝi, ke ĝi ne kreas etnon!

Ne malofte oni demandas kiel traduki en Esperanton la frazeologiajn esprimojn. La demando estas maltrafa. La trafa demando devas esti kiel traduki en Esperanton etnan tekston. Ne gravas ĉu temas pri frazeologiaj aŭ nefrazeologiaj esprimoj, en kiuj estas vestita la teksto. Oni tradukas ne frazeologiajn aŭ nefrazeologiajn esprimojn. Oni tradukas tekston. Kaj la ununura postulo al la traduko estas, ke ĝi fidelu al la etna originalo.

Ljubomir MIĤAJLOV

POŝTISTA KONFERENCO

La 8-an—10-an de novembro 1985 en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica la Poŝtista Sekcio ĉe BEA okazigis sian Sepan Nacian Scienc-Praktikan Konferencon kun uzado de Esperanto. La konferenco estis dediĉita al la 40-a datreveno de la venko super germana faŝismo kaj japana militarismo. Partoprenis esperantistoj-poŝtistoj el Sofio kaj el multaj aliaj loĝlokoj.

La konferenco malfermis la sekcia prezidanto Draguŝko Petrov. Per unuminuta silento la ĉeestantoj omaĝis al la memoro de ĉi-jare forpasintaj E-veteranoj Asen Grigorov kaj Dimităr Sokolov.

Enkadre de la konferenco oni traktis aktualajn problemojn de poŝto kaj telekomunikado: „Kurso al modernigo de la telegrafa reto en PR Bulgario“ — de ing. Georgi Stoilov, kandidato de teknikaj sciencoj el la Scienc-Esplora Instituto pri Komunikado; „Stato kaj problemoj de mekanikigo kaj aŭtomatigo de la poŝta komunikado en PR Bulgario“; „Komunikado kaj socio“ de Ivan Jordanov.

Dr. SIMEONOV

¹Etnano — en la okazo: denaska parolanto de la koncerna lingvo — noto de la Red.



90 jaroj de la naskiĝo de
Sergej Jesenin (1895—1925)

ĈU VIVAS MI, AŬ ĈU MI VIVIS ?

Dum la forpasintaj jaroj la Jesenin-verkaro estis diverse, eĉ per profunda silento, pritaksata de la kritikistoj. Spontane kaj ne cerbumante tamen, kiel deziratan poezian panon, akceptis kaj akceptas ĝin la multnombraj poeziŝatantoj. Plena de freŝaj sentoj, de subtilaj sonoj, aromoj kaj koloroj, penetrita de milda amo al ĉio vivanta, la poezio de S. Jesenin ne maljuniĝas.

La admirinda talento de la poeto aperis, ekfloris kaj rapide atingis sian maturecon. Pura kaj abunda fonto de ĝia lirika inspiro estis la rusa naturo. Jesenin estis pasie enamiginta en sian patrolandon. Li kreis ravajn versojn-bildojn pri „la hejma ter“.

Jesenin ĉiam restis fidela al si mem. Li vivis pere de sia poezio, poeto kaj homo estis unu tuto. Sed dum lia nelonga vivo la vojoj ne ĉiam estis rektaj kaj glataj. Estis duboj kaj devioj.

Jesenin mem nomis sin „lasta poeto de la vilaĝo“. Tiel vere estis, sed la fortaj ventoj de la Granda Oktobro alportis ankaŭ por li novajn strebojn.

La lastaj jaroj de Jesenin donis la plej maturajn poezifruktojn — la ciklon „Persaj motivoj“, la poemojn „Pugaĉjov“, „Lenin“, „Anna Snegina“, multajn belegajn versaĵojn kaj malgrandajn poemojn — „Al la poetoj de Kartvelio“, „Kapitano de la tero“, „Stancoj“, „Mia vojo“ k. a. Post la impeta krea florado, ŝajne la vivofortoj de la juna poeto elĉerpiĝis. Apenaŭ atinginte la aĝon de tridek jaroj, laŭ sia propra volo, li forlasis la mondon (decembro 1925). Tamen restis lia nekomparebla poezia heredaĵo. Per sia poezio li vivas kaj vivos — ĉiam necesa kaj amata.

Multe da Jesenin-poeziaĵoj estas tradukitaj en Esperanto. Konata estas la verslibro „Versoj elektitaj“ (Moskvo, 1965). Ĝi enhavas tradukojn de K. Gusev, S. Rubljov, I. Ĥores, H. Drezen. Ankaŭ nia neforgesebla E-poeto Asen Grigorov belege esperantigis kelkajn Jesenin-versaĵojn. La du poeziaj perloj de li rekreitaj nelonge antaŭ lia forpaso, estas ĉi-apude por unua fojo publikigitaj.

Stefka KALIMENOVA

SERGEJ JESENIN

SLEDOJ

Aŭdu! Glitas sledoj, aŭdu! Sledoj glitas!
Bone, se kun kara tamen ni rapidas.

Blovas gaja vento, milda, delikata,
tintas tamburino en la kampo glata.

Eĥ, vi sledoj, sledoj! Vi, ĉevalo mia!
En la kamp' acero dancas tutebria.

Kio do okazas! Kuras ni galope.
Kaj ni dancas kune kun l'acer' triope.

1925

* * *

Nigra nokto. Mi ne dormas,
iras mi al la river'.
Fulmo sur la ondojn sternas
sian zonon de l'ĉiel'.

Sur altaĵ' betul'-kandelo
staras en arĝenta lum'.
Venu, mia koro, venu
Aŭdi guzlokanton nun.

Mi vin amas, vin admiras,
ho, belega amatin',
danci mi ekiras, ŝiras
la vualon de la fin'.

En arbaro, en mallumo,
en la silka flortapis',
mi vin portos en brakumoj
ĝis papava matenig'.

1911

El la rusa: Asen GRIGOROV

* * *

Mi ne vokas, ne sopiras plore,
ĉio pasos, kiel frua fum'
de l'pomarboj blankaj. . . Velkos ore
povra mi, kaj ne revenos jun'.

Vi ne tiel batos, kor' nejuna,
frido vin tuŝetis en la fin'.
Kaj ne plu la ter' betulkatuna
logos vagi nudpiede min.

Vagspirito, vi fajrigas rare
miajn lipojn, sentojn en la fund'.
Mia freŝo velkis for amare,
elĉerpita mia sentinund'!

Pli avaras mi en ardo kora,
mia vivo, ĉu mi sonĝis vin?
Kvazaŭ mi sur la ĉeval' aŭrora
rajdis frue tra la stepa sin'.

Ĉiuj en la vivo ni nur gastas,
fluas flustre kupro de l'acer'. . .
Estu bona ĉio, kio hastas
flori kaj forpasi de la ter'.

1921

Tradukis K. GUSEV

NOVJARA MESAGO

La lasta tago. Morgaŭ nova jaro
 Sur ter' komencos ruli sian radon.
 Sed kion portas ĝi por la homaro?
 Ĉu pacon, aŭ senbridan vetarmadon,
 Abundan je streĉeco kaj teruro
 Kaj minacantan eston de l'futura.

Deziras mi, ke jar' venonta estu
 Por ĉiu homo jaro de feliĉo.
 Ke amikec', fratec' sin manifestu
 Sen tim', perfid', sen ajna superstiĉo;
 En nia mond' antikva kaj kreiva
 Kaj destinita ne por mort', por — vivo.

P. ĈOLAKOVA-BOJAĜIEVA

MIA REVO

Ho, lasu min revil! Mi ŝatas imagi
 la vivon estontan sur nia planedo.
 Ne bomboj atomaj, sed granda, potenca
 armeo scienca en servo de l'homo!
 Ne plu kancero, nek iu alia
 danĝera malsano! Estigos la homoj
 senmortaj, trinkante fruktsukon aŭ iun
 alian miraklan trinkadon de l'dioj
 Olimpaj iamaj. Pardonu, de dioj
 nuntempaj, al kiuj permesis la konoj
 sukcese finvenki eĉ leĝojn naturajn.
 Demandos vi eble: „De kie produktoj
 kaj loko sur tero por tiom da homoj?
 Ja Maltus delonge konvinkis. . .“ Ho, lasu!
 Denove kemio, denove scienco
 nin helpos sendube. Ni havos nutraĵon
 el marprofundaĵo, el tera riĉeco.
 Ni loĝos sur tiu aŭ iu alia
 planed' transformita. Sed loko ne mankos,
 laboro ne mankos kaj estos aero
 por ĉiu sub tiu belega ĉielo.
 El tuta animo permesu min kredi,
 ke havos, sendube, la homoj racion
 elektii: ĉu fino terura de ĉio,
 aŭ paca, belega estonto ekestu.

CANKO MURGIN

ODO AL JURNALISTO

Al Ivan Keremidĉiev-Esperov
 okaze de lia 75-jariĝo

La radaro
 de l'homaro
 ĵurnalisto estas —
 li muzikas,
 mozaikas
 pri soci-tempoj.

Li — sur monto —
 klara fonto
 al ĝardenoj fluas —
 akvofalo
 al centralo —
 li salt-muĝe bruas.

Li — elektro
 kvazaŭ spektro —
 helas domoj buntaj

kaj arbare
 ofte faras
 segon de l'fi-trunkoj.

Per sputnikaj
 komunikoj
 li — herold' de l'vero:
 rul-destino,
 presmaŝino —
 gazetar-rivero. . .

Televide,
 tuj-rapide
 li projektas bildon —
 li — radaro
 de l'homaro —
 ĵurnalist' tre milda.



Tra la mondo

KONATIGO KUN LA KUBA E-MOVADO

Nun en la Kuba Esperanto-Asocio membras 1400 esperantistoj. En 14 landaj lernejoj 65 instruistoj instruas Esperanton al 1200 geler-nantoj.

Nun ĉe KEA funkcias diversaj rondoj: 2 scienc-teknikaj, 3 junularaj, 2 — por pacde-fendo kaj po unu rondo de tradukistoj, instruistoj kaj geologoj. Komencis funkcii la teatra grupo „Nova Fonto“, kiu jam prezentis sian unuan spektaklon.

Kunlabore kun la Fremdlingva Eldonejo „Jose Marti“, KEA baldaŭ aperigos kvar titolojn: „Kuba ŝtata organizo“, „En marŝo kun Fidel“, „La lasta virino. . .“ kaj „Kubo nuntempe“. La unua jam eldonita kuba libro — „La historio alsolvos min“, aĉeteblas en la Libroservo de UEA. Prezo: 4.20 gld.

Kubaj esperantistoj partoprenis diversajn E-iniciatojn: la 70-an UK en Aŭgsburgo, la 18-an Konsultigon de Gvidantoj el E-Asocioj de Socialismaj Landoj en Sofio, la XII Festivalon de Junularo kaj Studentoj en Moskvo.

Andro Pinera PRIETO,
 vicprezidanto de KEA

GAZETA FENIKSO

Ekde aŭgusto 1985 denove ekzistas regula semajna Esperanto-gazeto en Eŭropo.

Semajna Bulteno „SB“, post unujara vintro-dormo, fenikse reaperis — en nova kostumo: ĝi nun alparolas la leganton pri Esperanto (renkontigoj, lingvo-instruo, literaturo, movado), kaj per Esperanto (etnaj kaj lingvaj problemoj, scienco, distroj). Krome ĝi celas rekte servi la unuopan esperantiston, perante rapidan interindividuan, intergrupan kaj interorganizan komunikadon.

Kompreneble, tiajn funkciojn la gazeto povas daŭre plenumi, nur se multaj legantoj subtenos ĝin per abono kaj kunlaboro. Do helpu ankaŭ vi!

Adreso: Esperanto-Domo Aarhus, Haslevang-svej 30, DK-8210 Aarhus V., Danlando.

IFER'86

La Organiza Komitato de „Internacia Foir Esperantista Renkontigo“ (IFER) decidis okazi la venontjaran aranĝon sub la ĉetfemo

„Leipzig — urbo de la Laborista Esperanto-Movado“.

Inter la 14-a kaj 16-a de marto 1986 la organizantoj bonvenigos interesitajn esperantistojn el la tuta mondo en la foira urbo Leipzig (Germana Demokratia Respubliko). Nia adreso estas:

Organiza komitato de „IFER“ '86
Bezirksleitung des Kulturbundes der DDR
(Distrikta Estraro de Kulturligo de GDR)
DDR — 7010 Leipzig
Käthe-Kollwitz-Straße 115

ESPERANTO EN UZBEKIO

La disvastiĝo de Esperanto en Uzbekio havas multjaran historion. Sian unuan kunsidon la esperantistoj el Taŝkento okazigis antaŭ 75 jaroj.

Nun la E-movado disvolviĝas ne nur en Taŝkento, sed ankaŭ en aliaj urboj. Funkcias E-klubo. Ilian agadon kunordigas Esperanto-Komisiono ĉe la Uzbeka Societo por Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando. En tiu ĉi komisiono membras pli ol 300 personoj.

La esperantistoj en Uzbekio korespondas kun geamikoj el 50 landoj. Jam estas tradukitaj kaj eldonitaj en Esperanto verkoj de uzbekaj klasikuloj kaj de nuntempaj verkistoj. Uzbekaj esperantistoj partoprenas internaciajn kongresojn, aranĝojn kaj tendarojn enlande, organizas regionajn renkontiĝojn de esperantistoj el Mez-Azio.

Irida BORISOVA,
Saahmat MUTALOV

Enlanda movado

ANTAŬJUBILEAJ ARANĜOJ EN RUSE

● Lige kun la 100-jariĝo de Esperanto speciala komisiono ĉe DE de BEA — Ruse, preparas jubilean albumon kun fotoj kaj adresoj de esperantistoj el Ruse kaj la distrikto. En la albumo estos nomaro de forpasintaj aktivuloj ekde 1900 ĝis nun. En tiu nomaro estos ankaŭ la nomo de Todor Gajdarov — reprezentanto de Ruse en la I Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj en urbo Veliko Târnovo, 1907.

● DE de BEA komencis la organizadon de profesiaj E-klubo — de instruistoj, medicinistoj, poŝtistoj, ĵurnalistoj. Ankaŭ la veteranoj kaj turistoj organizas siajn klubojn. Jam agadas E-societoj de oficistoj en la transporto, de kooperativanoj kaj laboristoj en diversaj lokaj fabrikoj. Membroj de ĵurnalista E-klubo preparas kaj eldonos en 1987 jubilean gazeton „100 jarojn Esperanto“, en bulgara lingvo kaj en Esperanto.

● Oni komencis la konstruadon de Distrikta E-Domo en la universitata kvartalo de Ruse. La domo estos solene inaŭgurita en la tago de 100-jara datreveno de Esperanto — la 26-an de julio 1987. En la domo estos enmasonita testamento al la E-generacio post 50 jaroj. La testamenton oni devos tralegi en la naskiĝtago de Esperanto en 2037.

Jordan KALINOV

MARISTA E-KLUBO

Antaŭ nelonge ĉe la entrepreno „Bulgara Rivera Navigado“ — Ruse, estis fondita Marista E-Klubo „Nikola Vapcarov“. Kiel prezidanton oni elektis ing. Jordan Kazakov — eksprezidanto de la Monda Studenta E-Asocio „STELO“ kaj organizanto de la unua „STELO“-kongreso, okazinta en Ruse en 1966.

La membroj de la nova klubo komencis korespondadon kun maristoj kaj aliprofesiaj laboruloj el la tuta mondo. En siaj leteroj la bulgaraj maristoj rakontas pri la bulgara mara kaj rivera transporto, pri nia socialisma lando kaj pri la deziro de nia popolo vivi en paco.

J. DIMITROV

EKSPOZICIO ORGANIZOTA

Honore al la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, oni intencas aranĝi en Sofio ekspozicion el bildkartoj en tri sekcioj: 1. D-ro L. L. Zamenhof sur bildkartoj. 2. Bildkartoj kun subskribo en Esperanto. 3. Kongresurboj de universaliaj kongresoj de Esperanto.

La ekspozicion preparos la konata bulgara esperantisto-kolektanto Georgi Litov, sub la aŭspicio de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj.

Esperantistoj el diversaj landoj estas petataj kontribui per disponigo de konvenaj ekspoziciaĵoj — ĉu donace, ĉu rekompence, kiujn oni sendu al adreso:

Georgi Litov, Hipodruma 34-A, 1612 Sofio, Bulgario

„BE“

KVARA ISEU EN VELIKO TÂRNOVO INVITAS VIN

Jam kvaran fojon, de la 20-a ĝis 25-a de julio 1986 en Veliko Târnovo, en la loka universitato „Kiril i Metodij“, okazos INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO.

Celo: plialtigo de la ĝenerala kulturo kaj lingva nivelo de la partoprenantoj.

Prelegos eminentaj bulgaraj kaj alilandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj.

Limdato por aliĝo: 31.05.1986. Validas la poŝtstampo.

Aliĝkotizo por eksterlandanoj: ĝis la 30-a de aprilo — 80 levoj, ĝis la 31-a de majo — 90 levoj.

Gejunuloj ĝis 35-jaraj rajtas rabaton: ĝis la 30-a de aprilo — 70 levoj, ĝis la 31-a de majo — 80 levoj.

Aliĝkotizo por bulgaroj: 70 levoj, por gejunuloj ĝis 35 jaroj — 60 levoj.

Aliĝilojn bonvolu peti de:

Bulgara Esperantista Asocio, P. K. — 266, BG — 5000 Veliko Târnovo, Bulgario



DEZIRAS KORESPONDI

BRAZIL

Nanci R. Prado (28-jara, fraŭlino) — CEP 05027, VI. Pompeia — San Paulo-SP, R. Ribeiro de Barros 240 — pri muziko, kino, legado kaj naturo; kolektas BK kaj PM.

BULGAR

Anelia Pančeva kaj Milena Radulova (13-jaraj) — 2035 Ljulin prohod, Detski sanatorium — dez. kor. kun ĉl, kolektas BK, PM.

Antoaneta Georgieva (26-jara, infandifektologiistino) — 4700 Smoljan, str. „Ĥristo Smirnenki“ bl. „Zdravec“ vh. A ap. 9 — dez. kor. kun ĉl.

Vladimir Ĥristov (24-jara, fraŭlo) — Sofio 1330 str. „Rumjana“ 24 „B“ ap. 51 — dez. kor. kun ĉl pri lingvoj, muziko, literaturo. Povas respondi ankaŭ françe kaj angle.

Galina Vladeva (17-jara lernantino) — Razgrad 7200 bl. Hemus vh. B ap. 22 — kun ĉl pri ĉt.

Margarita Marinova (18-jara lernantino) — Razgrad 7200 kv. Gecovo, ul. „Car Ivan Asen“ 23 — kun ĉl pri ĉt.

ĈSSR

Danuta Lotter — (17-jara studentino) — Havirov H. Sucha 735-35 Trojanovska 5/87 — pri fremdaj lingvoj, literaturo, muziko kaj sporto.

HUNGAR

Bogardi Andrea (19-jara, vartistino) — H-7500 Hagyatad Aradi u. 6/A — dez. kor. tutmonde.

Vago Eszter (18-jara, infanvartistino) — H-7500, Nagyatad, Alkotmany u 1 — dez. kor. tutmonde.

Attila Ambrus (35-jara) — H-4405 Nyiregyhaza Debreceni lit 4/A — dez. amikan korespondadon.

NOV-ZELANDO

Sonia Coles (12-jara lernantino) — North Island, Wellington, Upper Hutt, 21 McHardie Street — komencantino — dez. kor. tutmonde, kolektas afiŝojn, PM, BK.

MALTO

Silvan Mugliette (12-jara) — Gtraxaq, 7 str. St Theresa — dez. kor. kun knaboj, kolektas esperantajojn.

KUBO

Edilberto Rodriguez Acan (36-jara, elektro-teknikisto) — Camagüey 1, Apartado 98 — radioamatoro, ŝakludanto, kolektas kalendarojn kaj BK.

POLLANDO

Irena Plonska (19-jara) — 32-300 Olkusz, woj. Katowickie, ul. Długa 122 — pri fremdaj lingvoj: germana, latina, rusa kaj pri modo; kolektas BK.

Bronislaw Frasz (33-jara) — Jaworzno, ul. Jasminowa 27 D/48 — pri bulgara E-movado, turismo, geografio, literaturo.

ENHAVO

A. M. M'BOW. „Mi alte aprezas la internacian Esperanto-movadon“	11
VIOLIN OLJANOV. 1986 — Jaro de Paco . . .	1
* * Rezolucio de UNESKO pri Esperanto . . .	2
MARIA JANKOVA. Ni agu pli efike!	3
NEDKA VALJAVIČARSKA E-veteranoj jubileas	4
Cv. IVANOV. 80 jarojn „Vekiĝo“	4
PETKO PETROV. „Radio“ — 75-jara . . .	5
MITROFAN VELEV. Emocia renkontiĝo	7
M. BOJAĜIEVA. „Nia granda tago en UNESKO“	8
VERA GARVANOVA. „Ĝis kiam batas la koro“	9
MIRDZA BURGMEISTER. Ivan Krestanov skribis al Janis Rainis . . .	10
MANFRED ARNOLD. Neforgesebla tago	11
GEORGI MIĤALKOV. Valora verko pri Dimitrov	12
LJUBOMIR MIĤAJLOV. La frazeologiaj esprimoj kaj Esperanto	13
STEFKA KALIMENOVA. „Ĉu vivas mi, aŭ ĉu mi vivis?“	14
BELKA BELEVA. Nia Esperanto-Orfeo . . .	14

Sur la unua kovrilpaĝo: La Ĝenerala Direktoro de UNESKO s-ro Amadou Mahtar M'Bow manpremas la reprezentanton de UEA en la XXIII Sessio de UNESKO s-ron Tibor Sekelj, Sofio 1985.

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpita per majuskloj) La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajpsignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La redakcio akceptas la originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomon kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondantojn pri okazintaj arandoj oni sendu ĉiam tuj post la evento. La grupfotoj estu interesaj, movo plenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝt-karta formato.

Limdato por kontribuoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aperos en „BE“ plej frue post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

SOVET-UNIO

Sep knaboj — Denis, Vjaĉeslav, Boris, Sergej, Nikolaj, Anton, Dmitrio (12—13-jaraj). — dez. kor. kun gamklop el ĉl pri foto, ŝakludoj; inters. PM, BK, insignojn.

Membroj de E-klubo — Su-654000, Novokuzneck, ul. „25 let Oktjabrja“ 1, Inostrannij otdel biblioteki imeni Gogolja, E-klubo — dez. kor. tutmonde.

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAČEV, Dimităr HAĜIEV, Krástju KĀRUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303—Sofio,
Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

NIA ESPERANTO-ORFEO

Veselin Damjanov — 60-jara



La 20-an de novembro 1985 en la salono de Centra Domo de la Popola Armeo en Sofio okazis solena koncerto de la konata bulgara Esperanto-kantisto VESELIN DAMJANOV okaze de lia 60-jariĝo. Antaŭ multnombra publiko la jubileulo sin prezentis per riĉa programo el diversnaciaj muzikverkoj, kiujn li plenumis en Esperanto, itala, germana, hispana kaj franca lingvoj kaj denove ravis la publikon per sia bela voĉo kaj artismo.

Skizon pri lia vojo de homo kaj artisto faris la aktorino-esperantistino Belka Beleva, fragmentojn el kiu ni publikigas ĉi-sube.

* * *

Kantisto ekde sia infanaĝo, fidele al sia kantemo kaj muziktalento, la konata bulgara kantisto Veselin Damjanov jam kiel junulo konkeras la podiojn de la Mondaj Festivaloj de Junularo kaj Studentoj en Budapeŝto (1949), Berlino (1951), Bukureŝto (1953), Varsovio, Moskvo, Vieno. ... ĉiam gajnante la honoran titolon „laŭrea-to“!...

Diplomito de la Bulgara Ŝtata Konservatorio kaj de la Fakultato pri Franca Filologio en la Sofia Universitato, Veselin Damjanov estas jam solisto de la Reprezenta Horo de la Bulgara Popolarmeo kaj partoprenas multajn koncertvojaĝojn enlande kaj eksterlande.

En 1955 li estigas solisto de la Ŝtata Muzikteatro „Stefan Make-donski“ en Sofio, kie li kantas jam 30 jarojn. Dum tiu riĉa krea periodo Veselin Damjanov rolas kaj kantas en pli ol 70 operetoj, operoj kaj muzikloj (skeĉoj) kaj partoprenas en pli ol 1750 spektakloj, el kiuj nur en „Se mi estus reĝo“ — 100 fojojn, en „Cigana Barono“ — 156 fojojn kaj en „La reĝino de Ĉadaŝo“ — 208 fojojn!

Dum la opersezono 1966/67 Damjanov estas regula kantisto en la Ŝtata Opero de Liono, Francio, kie li sukcesplene kantas en la operoj „Don Juan“, „Rigoletto“, „Carmen“, „Madame Butterfly“, k. a.

Veselin Damjanov estas ankaŭ unu el la elstaraj bulgaraj estradaj kantistoj. Li havas tre riĉan repertuaron de bulgaraj, francaj, italaj, rusaj, hispanaj kaj alinaciaj kantoj. Pri lia artisma plenumado la kritikistoj notas: „Posedanta bonegan scenejan staturon kaj belan voĉon, ni ĉiam vidas en la persono de Veselin Damjanov la saman korektan kaj pensantan aktoron, kiu ne serĉas specialan atenton al si mem per la rimedoj de trograndigo, sed estas ĉiam fidele partnero en la tuta artisto ensemblo“. ... Ĝis nun la artisto donis ĉirkaŭ 1360 koncertojn. Pro lia aktiva artisto agado en la lando kaj alilande Veselin Damjanov estas distingita per la honora titolo „merita artisto“ kaj per la ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado (dufoje), per la medaloj „1300 jarojn Bulgario“, „100 jarojn de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, k. a. Li estas honorariata profesoro pri kantado en la Duonsupera Fako pri Estrada Muziko ĉe la Bulgara Ŝtata Konservatorio.

Pri Esperanto V. Damjanov ekscias jam en sia infanaĝo: lernanto en dua klaso de la elementa lernejo, li vizitas E-kurson, sed de tiu tempo li memoras nur la vorton „azeno“, per kiu la lektoro sin turnis al siaj kursanoj pro ilia maldiligenteco. ... Nur post 30 jaroj, laŭ invito de la konata bulgara esperantisto Kiril Drajev, honora membro de UEA, li por unua fojo partoprenas la artan programon de la 59-a UK de Esperanto en Hamburgo, de kie li revenas entuziasmigita kaj denove, jam memstare, komencas lerni la Internacian Lingvon. De post tiam li jam estas arda adepto de Esperanto.

UEA oficiale invitas lin partopreni la 60-an kongreson en Kopenhago, kie li bonege sin prezentas antaŭ internacia publiko. Unu el la plej malfacilaj taskoj, kiujn li

plenumas, estas la esperantigo de lia ampleksa repertuaro. Grandan helpon donis al li la bulgaraj poetoj Asen Grigorov kaj Simeon Simeonov. Pli malfrue ankaŭ li mem komencas traduki en Esperanto el la franca, rusa, itala. Damjanov partoprenas 10 universaliajn kongresojn de Esperanto. Lia populareco kreskas de kongreso al kongreso. Li estigis unu el la plej satataj kaj popularaj esperantaj kantistoj en la mondo. Por tio ege kontribuas ankaŭ la eldonitaj gramofondiskoj kun liaj kantoj kun esperanta teksto. Li estas aŭtoro de dudeko da kantoj laŭ originalaj tekstoj de E-poetoj, kiujn li inkluzivis en sian repertuaron.

Krome Damjanov dufoje partoprenis prezentaĵojn de la Bulgara Esperanto-teatro kiel rolulo. En Kopenhago li rolas kiel Pantalone en la komedio de Goldoni kaj en Lucerno, kune kun siaj kolegoj Belka Beleva kaj Anani Anev, prezentas la teatraĵon „Amo“ de Paul Gerdali sub la reĝisorado de la popola aktorino Stefka Prohaskova.

Ĝis nun Veselin Damjanov realigis kvar turneojn en Italio, tri — en Francio, du en Hispanio, po du en FRG, Svislando, Svedio, kaj la lasta unumonata turneo estis en Kanado, kie la kantisto ĝuis grandegan sukceson kaj popularecon. La eldonejo EMI-studio en Vankuvero eldonis kaseton „Veselin Damjanov koncertas en Kanado“ kaj 60-minutan video-kaseton „Veselin Damjanov kantas en Pierson College“.

Ĉiam kaj ĉie la koncertoj de Veselin Damjanov vekas vigran intereson pri la Internacia Lingvo kaj altiras novajn adeptojn, ĉar laŭ la vortoj de Zamenhof, „Nenia teoria prelego povas doni tian bonan efektan kiel kantado kaj aktora ludo!“.

La kanada gazeto „Times Colonist“ skribas „Gejunuloj el pli ol 50 landoj, kiuj studas en Pierson College entuziasme akceptis kaj aplaudis la majstran plenumon de la alveninta el fora Bulgario kantisto Veselin Damjanov“. En la Universitato en Vankuvero V. Damjanov donis koncerton, la gajnojn de kiu li donacis al la malsatanta loĝantaro de Etiopio.

Pro lia grava kontribuo por disvastigo de la Internacia Lingvo tra la mondo kaj por popularigo de nia socialisma patrujo la Estraro de Bulgara Esperantista Asocio dekoris la jubileulon per sia plej alta distingo — la „Honora Insigno“ de BEA.

Al nia kara kolego kaj samideano, al nia Esperanto-Orfeo Veselin Damjanov la bulgaraj esperantistoj bondeziras sanon, vigelecon kaj novajn grandajn sukcesojn!

Belka BELEVA